

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 592 (3)

MARTO 1955




foto de Italian State Tourist Office, Londono

BOLOGNA—Ĝardenoj Minghetti

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 7000



Enhavo

	paĝo
Post la venko : <i>Hans Jakob</i>	74
La flankaj efikoj : <i>I. Lapenna</i>	75
La Statuto de U.E.A.	78
Komuniko pri ISU ktp. : <i>Prof. D-ro I. Lapenna</i>	83
Invado de akridoj en Kanarioj : <i>J. Régulo Pérez</i>	84
Ivo Lapenna, heroo de Montevideo	89
Esperanto en la Itala Radio : <i>L. Minnaja</i>	92
Belarta Konkurso 1954 : Raportoj	96
Poemoj ..	80, 90, 100
Desegnaĵoj : <i>Dragutin Wranka</i>	91, 100
Konstantaj rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	76
40a Universala Kongreso, oficiala komuniko n-ro 4	87
Radio	88
Enigma konkurso n-ro 96	95
Novaj libroj ..	98
Esperantista vivo kaj Nekrologo	101
Oficiala informilo	102



“Inundo de verva, senpera poezio.” *J. Francis*

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 592

Marto 1955



Post la venko

KUN ĝojo la Esperantistaro eksciis pri la grava sukceso atingita en la Unesko-konferenco en Montevideo. Kiam la 11-an de Decembro la verkinto de nuna artikolo aŭdis la radio-informon, ĝuste post tagmanĝo, **“ke la Konferenco kvalifikis Esperanton kiel lingvon universalan”** (france : langue universelle), tiam li supozis ian mistifikon, minimume eraron de interpreto de vorto. Ricevinte semajnon pli frue preskaŭ pesimisman raporton de D-ro Lapenna, ni do sentis des pli grandan kontenton. La peno kaj zorgo dum pasintaj monatoj ricevis justan kompenson. Post tiu agnosko de la plej alta instanco tutmonda pri kulturaferoj konvenas, ke ni serioze ekzameni la situacion kaj trovi plej bonan manieron por eluzi la venkon, ĉar tia ĝi estas ! Ne estas *decida* venko en la ĉefa postulo nia : **la enkonduko de nia lingvo en instruadon oficialan**, sed estas ŝtupo je ĝi. Dependas de ni ĉiuj, de nia oferemo, de nia kunlaboro, ĉu ni sukcesos konstrui ion solidan sur tiu fundamento metita en Montevideo.

Ni, kiuj partoprenis la unuan grandstilan klopodadon en tiu ĉi direkto, nome la diskutadon pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj, scias taksu la valoron de la nuna sukceso, despli, ke la kondiĉoj en Montevideo estis entute multe pli malfavoraj, ol siatempe en Genève. De la granda raporto pri **“Esperanto kiel internacia helplingvo”** aperigita tiam de la Ligo de Nacioj ĝis la nuna agnosko per rezolucio en Unesko estis longa vojo, kondukinta tra krizoj de la homaro, apenaŭ klare perceptataj de ni samtempuloj.

Estas la tasko nuna de la decidantaj instancoj de UEA doni direktivojn al niaj aktivuloj, kio devas esti farota. Sed ne imagu al vi ke sufiĉas, ke la centraj organoj de l' Asocio esploru, diskutu kaj decidu kio estas farenda. Ĉio dependas finfine de la popolo esperantista, kies laboro kaj obolo estas la escencaj iloj por nia plua aktiveco.

Hans Jakob.

Pro la multo da aktuala kaj urĝa materialo ni devis bedaŭrinde prokrasti aperon de : la premiitaj verkoj de Belarta Konkurso 1954, *Korespondu !* (drameto) de A. Seemann kaj *Fraŭlina pudoro similas al oro* (novelo) de G. C. Jervis, artikolo de C. Støp-Bowitz pri NEL, artikoloj pri kluba vivo de J. Guillaume kaj D. Kennedy, *Rapida promeno tra Bolonjo* de L. Tadolini, art. pri Tutmonda San-Organizo (OMS) kaj pluraj aliaj artikoloj, recenzoj ktp. Ĉio aperos laŭeble baldaŭ.—*La Redakcio.*

La Flankaj Efikoj

ĈIU, kiu iom atente tralegis la artikolojn kaj informojn pri la klopodoj kondukintaj al la historiaj decidoj de UNESKO, povis facile konstati la kunligitecon de la diversaj aktivecoj.

La tuta laboro estis, krome, tiel planita kaj organizita, ke en ĉiu okazo ĝi nepre devis utile efiki je la plua disvastigo de la Internacia Lingvo, je firmigo de ĝia pozicio kaj je altigo de la reputacio de la Esperanto-Movado.

La sukceso atingita en la Ĝenerala Konferenco estas per si mem granda kaj brila, sed oni devas ne forgesi, ke ĝi estas la kulmina produkto de aro da aliaj atingoj. Ili ĉiuj, senescepte, portis Esperanton al la venko, sed ĉiu el ili signifis samtempe ankaŭ faktoron de diskonigo kaj disvastigo de la lingvo.

Tiuj ĉi flankaj atingoj estas divideblaj je tri ĉefaj kategorioj: esploroj, dokumentado, informado.

Sur la kampo de esploroj estis faritaj pluraj enketoj pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, pri la metodoj de lernado, disvastigo de informoj per la Esperanta gazetaro, apliko de Esperanto en radio kaj internaciaj intelektaj interŝanĝoj, socia konsisto de la Esperanto-Movado, nombra disvastiĝo kaj kresko de la Esperantistaro, aspektoj de la Esperanta literaturo kaj kelkaj aliaj malpli gravaj. Speciala enketo estis entreprenita kun la celo esplori la starpunkton de la politikaj partioj kaj diversaj kulturaj medioj rilate al la demando de komuna lingvo en la internaciaj rilatoj ĝenerale, kaj koncerne la signifon kaj rolon de Esperanto, speciale.

La rezultoj de la enketoj, esploroj kaj studoj estis poste konigitaj ne nur al Sekretariato de UNESKO kaj al ĉiuj UNESKO-komisionoj en la mondo, sed ankaŭ al multaj aliaj internaciaj organizaĵoj, studcentroj kaj institucioj. Kelkaj el la dokumentoj, tradukitaj en naciaj lingvoj, estis publikigitaj en presita formo en pluraj miloj da ekzempleroj. Ili atingis ĉefe la edukajn, sciencajn kaj ĝenerale kulturajn mediojn de la koncernaj landoj. La granda Ekspozicio en Montevideo, kvankam aranĝita antaŭ ĉio por la delegitoj de la Konferenco, fakte estis vizitata de miloj da personoj kaj plej konvinke pledis por la unuaranga kultura valoro de Esperanto.

Fine, la nura fakto, ke UNESKO okupiĝis pri Esperantoek interesigis la gazetaron kaj la radion. Pri la temo "Esperanto—UNESKO" aperis inter la Pariza Konferenco de 1952 kaj la Montevidea de 1954 ĉ. 1,500 artikoloj en gazetoj kaj revuoj de la mondo. Dum la Konferenco en Montevideo estis publikigitaj pliaj ĉ. 1,000 artikoloj. La nombro de informoj, aperintaj post la akcepto de la fama Rezolucio, estas nekontrolebla, sed certe ĝi atingas kelkajn milojn. Ankaŭ multaj radio-stacioj informis.

Paralele kun tiuj atingoj ĉiam pli kaj pli bone organiziĝis la informaj fakoj de niaj landaj asocioj. Lertiĝis diversaj kunlaborantoj. Estis eblaj multaj personaj kontaktoj en naciaj kaj internaciaj medioj. La tuta Movado ricevis freŝan impulson kaj vigliĝis. La pozicio de Esperanto konsiderinde pliboniĝis. UEA mem fortiĝis kaj komencis konsciiĝi pri la ĉiam pli grandaj taskoj kiuj atendas ĝin.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

La plej sukcesa laborjaro

EN la lasta bulteno, aperinta en la Oktobra numero de *Esperanto*, la Sekretariejo de CED atentigis, ke inter la 1-a de Oktobro 1954 kaj la fino de Januaro 1955 CED kaj ĝiaj kunlaborantoj okupiĝos ekskluzive pri la demando de la Internacia Lingvo antaŭ UNESKO. Kiel oni povis legi en la Februara numero de nia revuo, tiu ĉefa tasko estis plensukcese efektivigita kaj nun CED povas repreni ĉiujn siajn normalajn aktivecojn.

La ĉefaj laboroj, plenumitaj ek de Oktobro, estas la eldono de la unua presita verko de CED "La Internacia Lingvo—Faktoj pri Esperanto", la eldono de la 22-paĝa dokumento CED/4 sub la titolo "La Internacia Lingvo kaj la Kontribuo de la Esperanto-Movado al la Celoj de U.N.E.S.C.O." en la lingvoj angla, franca, hispana kaj nederlanda, la organizo—en kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo—de la

plej granda ekspozicio en la historio de la Esperanto-Movado (Montevideo de la 17-a de Novembro ĝis la 12-a de Decembro 1954) kaj la vasta diskonigo pere de la gazetaro kaj radio de la rezultoj atingitaj en Montevideo.

Jam en Januaro, tuj post la reveno de la Honorofica Direktoro, CED rekomencis la regulan sendadon de siaj dokumentoj al gravaj internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj, al diversaj sciencaj institucioj kaj institutoj pri internaciaj demandoj. En la nuna momento CED sendas la dokumentojn al 164 adresoj en 67 landoj. La nombro de kunlaborantoj estas 81 en 20 landoj.

Kiel oni scias, CED estis fondita la 1-an de Januaro 1952. En nuraj 3 jaroj tiu scienca institucio de la Esperanto-Movado evoluigis tre grandan aktivecon en plej diversaj direktoj kaj atingis konsiderindajn rezultojn, de jaro al jaro ĉiam pli signifajn, per vere minimumaj financaj

Jes, taskoj, ĉar ĉiu nova atingo, ĉiu sukceso aŭ eĉ nura sukceseto starigas novajn problemojn kaj postulas novajn devojn. Des pli tiel granda venko, kia estas la agnosko akirita en Montevideo.

Antaŭ nelonge mi legis, ke ni ne povos atingi la finan celon per niaj propraj fortoj, ĉar nombro impona por atingi tion neniam ekzistos. Tio estas pli ol malĝusta. Ĉio, kion ni atingis, ni atingis pro la admirinda interna forto de Esperanto kaj pro la bone planita, firme organizita, harmonie kunordigita laboro sur diversaj kampoj kaj laŭ pluraj vojoj, kondukantaj al la sama celo. Nun, post Montevideo, la Esperanto-Movado certe povas en la sekvantaj jaroj vaste progresi en ĉiu senco kaj en ĉiu direkto. Necesas nur scii kaj voli.

Ĉu ĝi vere maturiĝis por scii, ĉu ĝi senkompromise kuraĝos voli?
La baldaŭa estonteco ĝin montros!

I.L.

rimedoj. Oni memoru, ke la tuta budĝeto de CED estas proksimume egala al duono de jara salajro de kiu ajn lingvoinstruisto en kiu ajn lando de la mondo. CED povis plene realigi la laborplanon kaj eĉ transpasi ĝin nur dank' al ofero de siaj kunlaborantoj, kiuj senescepte, de la getradukantoj ĝis la direktoro, plenumas siajn taskojn honorofice, kiel ankaŭ dank' al mondonacoj de pluraj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj. Bedaŭrinde, en la pasinta jaro la donacoj atingis eĉ ne kvaronon de la kutima sumo, kvankam ĝuste en 1954 CED havis la plej bonajn rezultojn. En tiu jaro al CED oni donacis entute la sumon de £55-19-4. Dankante al ĉiuj donacintoj, *CED samtempe petas ĉiujn esperantistojn kaj Esperanto-organizaĵojn finance helpi al CED sendante donacojn aŭ monon kolektitan en la grupoj al Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X, Francujo, aŭ rekte al CED.*

“La Internacia Lingvo”

En nuraj kelkaj semajnoj post la publikigo de tiu ĉi verko jam estas disvenditaj ĉ. 500 ekzempleroj. Novaj mendoj alvenas ĉiutage. La ĝisnunaj recenzoj pri la verko alte taksas ĝian valoron el ĉiuj vidpunktoj, sed speciale el la dokumenta. Ĉar okazis miskomprenoj pri la signifo de la vortoj “ĉiuj rajtoj rezervitaj”, CED atentigas, ke oni povas uzi la materialojn el la verko en publikaj paroladoj, por verkado de prelegoj kaj artikoloj, por citado en aliaj, precipe nacilingvaj verkoj, ĝenerale por informado. Tio, ja, estas unu el la ĉefaj celoj de la verko. En la enkonduko estas klare montrite kiel

utiligi la libron plej efike. Oni agu laŭ la konsiloj entenitaj en tiu enkonduko.

Kun la permeso de CED, la verko nun estas tradukata en la francan lingvon kaj aperos, iom kompletigita, en tiu ĉi lingvo dum 1955. Por kompleta aŭ parta traduko en naciajn lingvojn estas necesa antaŭa rajtigo de CED.

Esperantaj radioelsendoj en 1954

Laŭ la statistiko, kiun faris la kunlaboranto de CED sinjoro Larglantier, en 1954 entute okazis 1,014 Esperantaj radioelsendoj de 20 radiostacioj. Kursojn pri Esperanto disaŭdigis Paris, Rio de Janeiro, La Coruña kaj Barcelona. Esperantlingvajn programojn disaŭdigis Bern, Hilversum (3), Lille, Wien (2), Roma, Valencia, Zagreb, Guatemala, Caramulo, Montevideo. Nacilingvajn programojn pri Esperanto kun partoj en Esperanto disaŭdigis Manresa, Tarragona kaj Beograd. Estas menciinde, ke en 1952 entute okazis 741 Esperanto-programoj. En 1953 okazis 845 Esperanto-programoj, dum en 1954, kiel dirite, la nombro estis 1,014. Kresko kompare kun 1953: 160 programoj; kompare kun 1952: 273 programoj.

Mallongaj Informoj

Sinjoro Tibor Sekelj, kunlaboranto de CED, entreprenos grandan vojaĝon en la landoj de Proksima Oriento kun la celo informi pri Esperanto la aŭtoritatojn kaj la larĝajn popoltavolojn de la vizitataj regionoj.

Sinjoro M. Gjivoje, kunlaboranto de CED publikigis verkon “Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio”.

La libroj, gazetoj kaj alia materialo de la Unua Universala Ekspozicio de

STATUTO de UEA

La Komitato de UEA decidis en Haarlem okazigi ĝeneralan voĉdonon pri diversaj ŝanĝoj de nia statuto. La propono estis malakceptita. Nun komitatano Jan Strönné, apogita de 8 aliaj komitatanoj, prezentas novan statutproponon, kiu iom diferencas de la origina. Por ebligi plej vastan publikecon de tiu propono ni nun aperigas la kompletan statuton, laŭ la propono de komitatano Strönné. La Estraro decidis permesi diskuton en nia revuo pri tiu projekto, sub la kondiĉo ke la koncernaj artikoloj estu mallongaj, koncizaj kaj sen personaj atakoj.

E. Malmgren, Prezidanto.



PROJEKTO DE STATUTO

I. ĜENERALAJ PRINCIPOJ

1. **Titolo.** La nomo de la asocio estas: Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.). La Universala Esperanto-Asocio (fondita la 28an de aprilo 1908) kaj Internacia Esperanto-Ligo (fondita 1936) kunfandiĝis en unu organizaĵon kun la nomo Universala Esperanto-Asocio je la 28a de aprilo 1947.

2. **Konsisto.** La Asocio konsistas el Esperantistaj organizaĵoj, asociaj kaj individuaj membroj.

3. **Celoj.** Ĝiaj celoj estas:—

disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri nacieco, raso, religio, politiko aŭ lingvo;

kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;

zorgi pri la kunagado de Esperantistaj organizaĵoj;

krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio;

okazigi la Universalajn Esperanto-Kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.

Por la plenumo de siaj celoj la Asocio rajtas akcepti aŭ akiri proprajn kaj povas elekti kuratorojn por daŭre posedi tiujn laŭ kondiĉoj difinitaj de la Komitato.

4. **Neŭtraleco.** U.E.A. estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj.

Esperanto estas enpakitaj kaj troviĝas en Montevideo je dispono de la Esperanto-Movado. Pri organizado de la Ekspozicio en aliaj lokoj okupiĝos estontece la Informa Fakto de UEA.

Pluraj verkoj, gazetoj, revuoj estis senditaj al Montevideo en kelkaj ekzempleroj por la granda Ekspozicio. Tiujn pliajn ekzemplerojn oni apartigis kaj disponigis al Sinjoro Tibor Sekelj, por ke li povu utiligi tiun valoran materialon dum sia vojaĝo, komenciĝonta en Aprilo

ĉijara. Ĉio, kion oni sendis al Montevideo por la Ekspozicio, estis kaj estos efike utiligata.

Donacoj al CED ĝis la fino de 1954

	£	ŝ.	p.
Stato je 31 Aŭg. 1954	..	51	10 2
J. Van Gulck, Belgujo	..	10	0
Gesinoroj Laurie, Britujo	..	1	0 0
J. Dedieu, Francujo ..	..	1	0 0
R. Zollinger, Svislando	..	6	0
F. W. Shaw, Britujo..	..	1	1 0
H. Amaral, Portugalujo	..	12	2
Entute ĝis la 31-a Dec. 1954	..	£55	19 4

U.E.A. deklaras, ke la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo. Ĝia sinteno estas diktata de la ideoj celoj de la Esperanto-movado. Ĝi rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur ne-politika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.

5. **Lingvo.** La oficiala lingvo de U.E.A. estas la Zamenhofa lingvo Esperanto, tia ĝi estas difinita per sia fundamento kaj per sia verkaro.

6. **La Sidejo.** La ĉefsidejo de la Asocio estas en Anglujo. La sidejo de la Serva Centro estas en Genève, Svislando. La Estraro rajtas funkciigi aliajn oficejojn laŭbezzone.

7. **Administra jaro.** La administra jaro estas la kalendaro jaro.

8. **Ofic-daŭro.** Ĉiuj oficoj daŭras tri jarojn; la oficohavantoj estas reelekteblaj. La organoj, kiuj laŭ la statuto elektas la oficohavantojn, povas al ili esprimi sian malkonfidon pli frue kaj je ilia loko elekti aliajn.

9. **Respondeco.** Pri la agoj de siaj reprezentantoj kaj oficistoj la Asocio estas nur tiom respondeca, kiom tiuj agoj okazis laŭ la kompetenteco kiun por ĉiu ofico difinas la statuto aŭ la regularoj.

La Asocio malakceptas ĉiun financon respondecon pri la funkciado de la servoj.

Tiu ĉi statuto kaj la regularoj estas devigaj por ĉiuj aliĝintaj organizaĵoj kaj membroj.

II. MEMBRECO

10. **Membro-kategorioj.** La Asocio havas jenajn kategoriojn de membroj.

- (a) Asociaj Membroj (A.M.) are aligitaj de la aliĝintaj asocioj.
- (b) Individuaj Membroj, individue enlistigitaj de U.E.A.
- (c) Honoraj Prezidantoj kaj Membroj.

11. **Akcepto de membroj.** Kiel Individua Membro povas esti akceptata ĉiu honorinda persono.

12. **Apogantoj de U.E.A.** estas personoj, kiuj apogas la celojn de la Asocio, kaj kiuj estas akceptitaj laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo. La apogantoj havas neniajn rajtojn en la Asocio.

III. LANDAJ ASOCIOJ

13. **Aliĝkondiĉoj.** Ĉiu Landa Asocio Esperantista povas aliĝi al U.E.A., se ĝi havas la nombron da membroj fiksitan en la Ĝenerala Regularo, se ĝi estas laŭorde organizita kaj si vidiĝas klare el ĝia statuto, ke temas pri asocio neŭtrala laŭ la senco de Par. 4. Principe U.E.A. akceptas el unu regno nur unu landan asocion.

Landa Asocio pagas por ĉiuj siaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj de U.E.A., sumon difinitan en la Ĝenerala Regularo.

IV. ALIAJ ORGANIZAĴOJ

14. **Aliĝkondiĉoj.** La internaciaj Esperantistaj fakaj asocioj neŭtralaj povas aliĝi al U.E.A. laŭ la samaj kondiĉoj kiel la landaj asocioj.

15. **Kontraktoj kun Fakaj Asocioj.** Kun internacia Esperantista faka asocio neŭtrala la Asocio povas fari kontrakton pri komuna agado, interŝanĝo de servoj k.t.p. La Estraro estas rajtigita fari kun ĝi kontrakton pri speciala kotizo aŭ pri aliĝo de ĝiaj membroj kiel asociaj aŭ individuaj membroj de U.E.A.

La Komitato aprobas aŭ malaprobas kontraktojn kun la fakaj asocioj.

16. **Kontraktoj kun neneŭtralaj asocioj.** La Asocio rajtas fari kontraktojn pri kunlaboro kaj interŝanĝo de servoj k.t.p. kun internaciaj neneŭtralaj Esperantistaj asocioj, kondiĉe ke tiuj rilatoj ne estu en kontraŭeco kun la principo de Par. 4.

17. **Kontraktoj kun landaj fakaj asocioj.** La Asocio povas fari kontraktojn laŭ la samaj kondiĉoj kun landaj fakaj asocioj Esperantistaj post la aprobo de la koncerna landa asocio, se ĉi tiu aliĝis al U.E.A.

18. **Apogantaj Organizaĵoj.** Ne-Esperantistaj organizaĵoj, kiuj deziras montri sian simpatie al la Esperanto-movado, povas kiel apogantaj organizaĵoj esti akceptataj de la Estraro laŭ kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

V. EKSIGO KAJ EKSIGO

19. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu dum la kuranta jaro, malgraŭ averto, ne pagis la koncernan kotizon, estas konsiderata kiel eksiginta.

20. **Eksigo.** Membro aŭ organizaĵo, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de U.E.A., aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al U.E.A., povas esti eksigita de la Asocio.

La Estraro estas kompetenta pri la eksigo de la individuaj membroj kaj la Komitato pri la eksigo de organizaĵoj, post esploro laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo.

VI. ĈEFDELEGITOJ, PERANTOJ KAJ DELEGITOJ

21. Por reprezenti la Asocion en la diversaj landoj oni nomas Ĉefdelegiton aŭ Peranton.

En ĉiuj lokoj U.E.A. povas esti reprezentata de Delegito, Vic-delegitoj kaj Fak-delegitoj.

22. La Delegito varbas membrojn kaj funkciigas la servojn laŭ la kondiĉoj difinitaj en la Ĝenerala Regularo. La delegiteco estas sensalajra ofico.

23. **Elekto.** Delegitoj estas nomataj aŭ elektataj ĉiun trian jaron. Intertempe nomitaj Delegitoj funkcias ĝis la fino de la periodo.

VII. KOMITATO

24. **Konsisto.** La gvidado de la Asocio estas konfidata al la Komitato de U.E.A.

Ĝi estas elektata ĉiun trian jaron kaj konsistas el:—

Komitatanoj A, elektitaj de la aliĝintaj asocioj ;

Komitatanoj B, elektitaj de la Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj ;

Komitatanoj C, al-elektitaj de la Komitatanoj A kaj B.

25. **Elekto.** (a) Ĉiu aliĝinta asocio kun 150 ĝis 1,000 membroj elektas unu Komitatanon kaj unu plian por ĉiu komencita milo. La nombro de la Komitatanoj de ĉiu asocio restas sen ŝanĝo dum la oficperiodo, sed asocio, kiu aliĝas aŭ atingas pluan milon, elektas Komitatanon aŭ Komitatanojn por la resto de la periodo. Eksiĝintaj kaj mortintaj Komitatanoj povas esti anstataŭataj. Por la membronombro validas la ciferoj je la 31-a de decembro de la antaŭa jaro.

Se la nombro de la Komitatanoj A superas 40 personojn la Komitato rajtas plialtigi la supre fiksitajn elektociferojn.

(b) La Ĉefdelegitoj kaj Delegitoj elektas el internacia listo, pretigita laŭ la kondiĉoj en la Ĝenerala Regularo, unu Komitatanon por 250 Delegitoj. La Vic-delegitoj kaj Fak-delegitoj ne partoprenas tiun ĉi voĉdonon.

(c) Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj la Komitatanoj A kaj B povas

Eli Urbanová :

Vintro

Lilie blanka
estas korp' de Vintro.
Vidante Ŝin
sur la tegmentoj kuŝi
kun cic' glacia,
kun virgpura ventro,
vi, la unua,
iel timas tuŝi.

Blindiga belo
elloganta larmon.
Kion Ŝi scias
pri la urbpavimo ?
Vi, la unua,
taksas Ŝian ĉarmon
kaj baraktadas
inter pi' kaj krimo.

Tamen vi rabis,
homo senkompata !
Jen la unua
kaj li sin ne bridas !
Ĉar ĉiu tuŝo,
eĉ plej delikata,
postlasis signon,
kiu vin perfidas.

Cico = mampinto

kompletigi la Komitatanon, elektante pliajn Komitatanojn per sekreta voĉdono ĝis la kvarono de sia propra nombro.

Salajrata oficisto de U.E.A. ne povas esti komitatano.

Ĉiuj Komitatanoj estas samrajtaj kaj reelekteblaj. Tamen ne estas reelekteblaj Eŭropa Komitatano, kiu persone ĉeestis neniun Komitat-kunsidon dum la du lastaj oficperiodoj.

26. **Anstataŭantoj.** Komitatano elektita de Landa Asocio (grupo A), kiu ne povas partopreni Komitatkunsidon, devas nomi anstataŭanton, skribe aprobotan de la koncerna Asocio. Tiu anstataŭanto havas dum la koncerna kunsido la samajn rajtojn kiel ĉiu alia Komitatano.

27. Rolo. La Komitato :—

elektas inter siaj membroj Prezidanton kaj kvar ĝis ses pliajn Estraranojn ;
rajtas nomi Honoran Prezidanton kaj Honorajn Membrojn ;
difinas la ĝeneralan agadon de U.E.A. ;
decidas pri aliĝo de landaj kaj fakaj asocioj kaj pri kontraktoj kun fakaj asocioj ;
decidas pri la regularoj ;
aprobas la budĝeton kaj ekzamenas la financojn de la Asocio ;
decidas en kunveno dum la Universala Kongreso pri la agado de la Estraro dum la pasinta jaro ;
decidas pri la aferoj nerezervitaj al aliaj instancoj.

VIII. ESTRARO

28. Konsisto. La Estraro de U.E.A. konsistas el la Prezidanto, unu aŭ du Vic-Prezidantoj, la Ĝenerala Sekretario kaj el du ĝis kvar pliaj Estraranoj. La anoj de la Estraro loĝu prefere en landoj ne tro malproksimaj de la Asocia sidejo kaj deklaru sin pretaj partopreni la kunsidojn de la Estraro kaj de la Komitato.

29. Rolo. La Estraro, kiu estas respondeca al la Komitato :—

elektas inter siaj membroj unu aŭ du Vic-Prezidantojn ;
elektas inter siaj membroj Ĝeneralan Sekretarion ;
elektas la Redaktoron de la Revuo *Esperanto* ;
nomas kaj maldungas la Administranton de la C.O. kaj la direktorojn aŭ administrantojn de eventuale aliaj oficejoj ;
okazigas la Universalajn kaj aliajn Kongresojn kaj konferencojn ;
kreas novajn servojn aŭ aranĝojn ;
prezentas al la Komitato proponon pri la budĝeto kaj respondecas pri la financoj de U.E.A. ;
plenumas la decidojn de la Komitato pri ĉiuj aferoj superantaj la povojn de la Prezidanto, de la Ĝenerala Sekretario aŭ de la Administranto de la C.O.

30. Funkcioj. La Prezidanto de U.E.A. reprezentas la Asocion kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario la ĉefajn dokumentojn. Li prezidas la Komitaton, la Estraron kaj la kongresojn de U.E.A. Li kontrolas aŭ kontroligas minimume unu fojon ĉiujare la oficejojn. Li rajtas delegi alian Komitatanon

por difinita tasko. En esceptaj okazoj li havas la povon de la Estraro aŭ de la Komitato, al kiuj li raportu kiel eble plej baldaŭ por aprobo.

La Vicprezidantoj laŭnecese anstataŭas la Prezidanton.

La Ĝenerala Sekretario zorgas pri la efektivigo de la decidoj de la Komitato kaj Estraro ; kunmetas la jaran raporton pri la laboro de la Asocio kaj ellaboras la planon de la laboro por la estonta jaro ; prizorgas la mondan informadon pri Esperanto ; gvidas la eksterajn rilatojn de la Asocio ; plenumas aliajn taskojn, kiujn la Komitato aŭ la Estraro donas al li. La Ĝenerala Sekretario povas ricevi kompencon, fiksitan de la Komitato.

La ceteraj Estraranoj plenumas laŭbezone komisiitajn taskojn.

IX. LABORMANIERO

31. Kunsidoj. La Komitato kunvenas okaze de la Universala Kongreso ; krom tio la Estraro kunvenas almenaŭ unufoje ĉiujare en la Centra Oficejo.

32. Voĉdonado. En voĉdonadoj validas la plimulto de la voĉdonintoj ; okaze de voĉegaleco decidas la Prezidanto. Decidoj, kiujn partoprenis malpli ol duono de la Komitato aŭ de la Estraro, devas poste esti submetataj al skriba voĉdono, en kiu sufiĉas la plimulto de la voĉdonintoj. Komitatano sin detenas de voĉdono pri aferoj, kiuj koncernas lin persone.

33. Komisioj. Por esplori iujn problemojn, aŭ por la plenumo de difinitaj administraj taskoj, la Komitato aŭ la Estraro povas elekti inter aŭ ekster si reprezentanton aŭ specialajn komisionojn kun kontrolpovoj, sed ne rajtas transdoni al ili siajn povojn.

34. Kompenso. Por kovri la administrajn kaj vojaĝajn elspezojn de la Estraranoj la Komitato asignas certan sumon en la Budĝeto. La Komitato povas asigni al Komitatano kompencon por speciala tasko, kies plenumo postulas grandan tempoperdon.

X. UNIVERSALA KONGRESO

35. Celo. La Universala Kongreso estas internacia manifestacio de la Esperantistaro. Ĝi celas fortigi la solidarecon inter Esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn. La oficiala lingvo estas Esperanto.

La organizo de la Universalaj Kongresoj estas fiksita de la Komitato en la Kongresa Regularo.

XI. OFICEJOJ

36. Centra Oficejo. La Centra Oficejo (C.O.) de la Asocio estas gvidata de Administranto, kiu respondecas pri la taskoj de "Secretary" laŭ la brita leĝaro. Liajn laborkondiĉojn kaj salajron fiksas la Estraro. Li estras la tutan teknikan-administran laboron de la Asocio kaj preparas la budĝeton. Li sciigas la Ĝeneralan Sekretarion pri ĉiuj gravaj okazintaĵoj de la oficejo kaj submetas al la Estraro la aferojn bezonantajn ilian aprobon. Iniciato de proceso apartenas alla Estraro. Dokumentoj, en kiuj U.E.A. devigas sin al garantio, mendo aŭ pago je pli ol £50 devas porti la subskribon de la Prezidanto aŭ de la Ĝenerala Sekretario, kaj de la Administranto. Tio ne validas por la normala funkciado de la Oficejo.

La oficistoj de la Centra Oficejo estas nomataj de la Administranto, kiu fiksas iliajn salajrojn laŭ la bezono kaj la oficeja kutimo. Li raportas al la Estraro por aprobo.

XII. REVUO, BIBLIOTEKO

37. Revuo. La oficiala organo de la Asocio estas *Esperanto*, fondita de H. Hodler. *Esperanto* estas redaktata en la spirito de la fundamenta principo de la Asocio (par. 4) kaj laŭ la ĝeneralaj gvidlinioj kiujn fiksas la Estraro.

38. Biblioteko kaj Arkivo. La Biblioteko de U.E.A. portas la nomon "H. Hodler". Ĝi estas registrita en la listo de la specialigitaj bibliotekoj sub la titolo: Bibliothèque de la Langue Internationale.

XIII. FINANCOJ

39. Administrado. La Centra Oficejo administras ĉiujn monaferojn de la Asocio, kun escepto de la kapitaloj, kaj publikigas la jarbilancon.

40. Reviziado. Ĉiujare la tuta librotenado devas esti ekzamenata de revizoro leĝe rekonita, nomita de la Komitato.

La Komitato rajtas nomi komisionon inter siaj membroj por kontroli la tutan agadon de ĉiuj oficejoj.

41. Asocia kapitalo. La kotizoj de Dumvivaj Membroj, donacoj superantaj

sumon fiksitan de la Komitato kaj sen specialaj celoj, heredaĵoj k.t.p. formas la Asocian Kapitalon. La Estraro decidas pri eventuala uzo kaj ebla investo de la mono; ĝi rajtas elekti specialan administranton.

XIV. ĜENERALA VOĈDONO

42. Okazigo. Ĝenerala Voĉdono okazas: se la Komitato aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro ĝin decidas;

se aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas per sia subskribo, en tempolimo de tri monatoj, kalkulita de la unua ĝis la lasta subskribo;

La Administranto ĝin aranĝas plej malfrue du monatojn post ricevo de sufiĉa nombro da subskriboj. Je propono pri statutŝanĝo okazas voĉdono pri ĉiu aparta paragrafo.

Tiu voĉdonado povas nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton kaj dissolvi la Asocion; krome ĝi povas esprimi sin pri demandoj submetitaj de la Komitato.

43. Kalkulo de voĉoj. Ĉiu aliĝinta asocio havas nombron de voĉoj egalan al la nombro de siaj membroj.

Por voĉdonado validas la nombro de la membroj, por kiu la aliĝinta asocio pagis en la jaro antaŭ la voĉdonado. Por novaliĝinta asocio validas la nombro por kiu ĝi jam pagis, sed almenaŭ la minimuma nombro, kiu rajtas al aliĝo.

En lando kie ne ekzistas aliĝinta landa asocio la membroj voĉdonas individue.

En voĉdono validas la plimulto de la voĉoj esprimitaj. Por ŝanĝi la Statuton aŭ dissolvi la Asocion necesas du trionoj de la esprimitaj voĉoj, kondiĉe ke tiuj voĉoj reprezentu minimume duonon de la membraro.

44. Kontrolo. La ĝenerala voĉdonado estas skriba, kaj la voĉoj estas kalkulataj 90 tagojn post la forsendo de la voĉdoniloj. La voĉdonilojn kontrolas tri membroj nomitaj de la Komitato. Tiuj membroj skribe certigas la korektecon de la procedo. Komitatanoj rajtas ĉeesti kaj subskribi.

XV. DISSOLVO

45. En okazo de dissolvo de la Asocio la restanta havaĵo estas donacata al alia Esperanto-organizaĵo, kiun indikas la decido pri dissolviĝo.

KOMUNIKO

pri la ISU kaj pri la fakoj Informado, Gazetara Servo, Eksteraj Rilatoj

DUM 26 jaroj mi laboris, laŭ mia povo kaj eblecoj, por Esperanto. En la pasintaj jaroj mi oferis al la idealoj de la Esperanto-Movado kaj al la interesoj de UEA preskaŭ ĉiujn miajn fortojn kaj la plej grandan parton de mia tuta labortempo. Pri la atingitaj rezultoj ĉiu povas libere juĝi.

Dum la Paska Kunsido de la Estraro en 1954 mi atentigis en speciala deklaro, ke la Estraro en la nuna konsisto, ne havante unuecan koncepton pri la bazaj principoj de agado, ne povas plenumi la taskojn, kiujn havas la Asocio en la aktuala situacio en la mondo kaj interne de la Movado. Ĉar tiu stato tute speciale grave malhelpis la plenumon de la funkcioj komisiitaj al mi, mi informis pri la intenco eksigi el la Estraro dum la UK en Haarlem.

Ĝis la Kongreso en Haarlem, ne nur la Prezidanto, sed ankaŭ ĉiuj aliaj Estraranoj, krom du, decidis eksigi. En tiaj kondiĉoj la Unua Komisiono de la Komitato proponis, ke oni konsideru la tutan Estraron eksiginta kaj ke la Komitato elektu novan Estraron. Post longaj diskutoj, je insistaj petoj de la malplimulto, estis farita interkonsento, laŭ kiu, interalie, la tiama Estraro funkcios ĝis Bologna, sed ĉiuj Estraranoj devigis sin kontribui al la efektivigo de la laborplano, fiksota de la Komitato. La Komitato aprobis tiun interkonsenton. Fidante je la promesoj kaj esperante, ke fine la tuta Estraro, almenaŭ en tiu gravega periodo antaŭ la UNESKO-

Konferenco, plenumos la decidojn kaj intencojn de la Komitato, mi cedis kaj decidiĝis resti plian jaron en la sama Estraro.

La postaj eventoj—precipe en la semajnoj de plej streĉa kaj plej intensa aktivado por bone prepari la reprezentadon de nia afero antaŭ UNESKO—montris, ke nek la interkonsento, nek la decido de la Komitato rilate la Statuton estis observitaj fare de la ĉiam sama malplimulto en la Estraro kaj en la Komitato. Cirkuleroj nete kontraŭaj al la decidoj de la Komitato kaj al ĝiaj intencoj (pri kio ĉiu ajn povas konvinkiĝi komparante ilin kun la protokoloj) kreis konfuzon kaj miskomprenojn inter parto de la voĉdonantoj pri la nova Statuto. La cirkuleroj venis tiel neatendite kaj subite (almenaŭ por persono, kiu fidis je promesoj), ke estis neeble doni pli ampleksajn klarigojn sen riski seriozan endanĝerigon de la pozicio de Esperanto ĉe UNESKO. En la situacio, kreita per tiuj cirkuleroj, parto de la voĉdonintoj, verŝajne pro nesufiĉa informiteco aŭ miskomprenoj, esprimis sin kontraŭ la nova Statuto, kiu, laŭ la opinio de la grandega plimulto en la Komitato, estas antaŭkondiĉo de ĉiu plua progresado de la Asocio kaj de la Movado. Rezulte, iom pli ol kvarono de la voĉdonintoj malebligis la akcepton de la ŝanĝoj.

Tiu fatala rezulto signifas, laŭ mia profunda konvinko, absolutan malhelpon por ĉia ajn plua progresado. Ĉio, kio estis farebla laŭ la nuna Statuto, estas farita. Eĉ pli ol la fareblo, ĉar, laŭ la interpretado de

Invado de Akridoj en Kanarioj

Dumonata sturmado kaj plagado al la arĥipelago

MATENE, la 15-an de oktobro 1954, loĝantojn de Kanarioj surprizis flaveska supermara nuboj, kiu de sudoriento moviĝis direkte al la insuloj. Ĝi ne sekvis ortodoksajn nubovojojn kaj aspektis nekutima je koloro kaj aperformo. Antaŭ ol iu densa parto el tiu amaso estus atinginta la ĉefinsulon, fruemajn promenantojn heroldis avangardaj kurieroj el tiu nuboj: temis pri plago de akridoj.

Ne estas oftaĵo, ke akridaroj sturmas la arĥipelagon; tamen ankoraŭ famas plago el la jaro 1934; kaj la insularaj analoj memoras teruran invadon en 1799–1800. Mal-ofteco kaj damaĝoj altiras atenton al tiuj gastoj en niaj latitudoj; kaj certe pro ilia kuriozo multaj esperantistoj volos sciigi pri tiuj migremaj piratoj de la naturo, ĉefe tiuj samideanoj, kiujn neniam vizitis akridaro.




foto : A. García

Ĝenerale ĉiu tia nuboj pasas je proksimuma 20-metra alto de sur la tero; la diko de la amaso kutime staras de super tiuj 20 metroj ĝis trans vidatingo. Konsistigas la plagon miliardoj da insektoj, kiuj mezuras de 6 ĝis 8 centimetroj, havas grizajn, vertikale striitajn okulojn kaj mallongajn antenojn kaj posedas torakon kun tri sulkoj dispunktitaj per makuloj de obskura grizo. Se ni aldonas la sciencon nomon de la

kelkaj — ne laŭ mi — estis necese perforti kaj malobei ĝiajn principojn por povi plenumi la ampleksajn taskojn de la lasta tempo.

En tiaj kondiĉoj mi opinias la pluan oferadon de preskaŭ ĉiuj miaj fortoj kaj laboreblecoj al la Esperanto-Movado kiel neracian malŝparon de tempo.

Tial en la estonteco mi dediĉos min multe pli al miaj sciencaj studoj kaj privata faka laboro. Al Esperanto mi povos dediĉi maksimume 3–4 horojn tage kaj tiun tempon mi volonte oferos al tiu branĉo, kiun mi konsideras esence grava, nome al la Centro de Esploro kaj Dokumentado

kaj, ĝis Bologna, al rilatoj kun UNESKO. Per letero de la 3-a de Februaro mi informis la Prezidanton, ke mi demetas ĉiujn aliajn funkciojn en la Estraro ek de la 1-a de Marto.

Mi tre bedaŭras, ke la nuna situacio interne de la Movado devigas min al tiu paŝo. Mi korege dankas al ĉiuj, kun kiuj mi tiel bone kunlaboris dum pluraj jaroj, sed mi afable petas ne plu skribi al mi en aferoj rilatantaj al Internacia Somera Universitato, kiel ankaŭ al la fakoj Informado, Gazetara Servo kaj Eksteraj Rilatoj, ĉar pri tio mi ne plu okupiĝas nek respondecas.

Prof. D-ro Ivo Lapenna.

besteto, *Schistocerca peregrina*, kaj diras, ke ĝi apartenas al la familio de la akridoidoj, ordo de la ortopteroj, ni jam notis ĉiujn ĉefajn individuajn karakterizaĵojn de la vizitinto al Kanarioj dum la aŭtuno de 1954.

Plej proksima parenco de la *Schistocerca peregrina* estas la *Pachytylus migratorius*, malpli granda (de 4 ĝis 6 cm.) sed multe pli danĝera. Ĉi tiu estas la akrido faranta surdigan zumadon kaj formanta nubojn, kiuj obskurigas la sunon; ĝi estas ankaŭ la kaŭzanto de la famaj plagoj, kiuj ĝiseksterme damaĝas kultivojn kaj aliajn vegetaĵojn, kaj foje ĝi migras eĉ ĝis Germanujo kaj Polujo. Sed ĉi-foje ĝi ne estis la invadinto de Kanarioj.

La *Schistocerca* malofte eliras Afrikon kaj nur vere escepte ĝi atingas Kanariojn kaj Iberion. Oni-dire ĝia devenloko troviĝas en Mezafriko ĝis Sudano kaj la regiono de la lago Ĉado. Tiu vojaĝema akrido ŝajne

migras sen celo kaj neniam adaptiĝas definitive sur invaditaj teritorioj. Je la dua jaro de sia starto ĝi intencas reveni al sia originloko, sed pereas dum tiu revena klopodo. Ĉar ĝi ne estas kanaria endemiismo, ĝi konsistigas postdanĝeron nur por kultivoj de la jaro sekvanta tiun de la invado, pro tio, ke unu ino naskas inter 500 kaj 1,000 individuojn, kiuj en la venontaj printempo kaj somero jam sufiĉe elvolviĝis. Sed tuj post naskiĝo junaj akridoj havas multajn malamikojn, kiel fungoj, insektoj, bakterioj, muŝoj, ktp, kiuj sin parazite nutras je ili. Postvivantoj, kiel supre dirite, pereas dum klopodo reatingi sian normalan vivejon.

Ĉu dirindas io speciala pri la pasintjara plago en Kanarioj? Nu, kvankam la *Schistocerca* ne estas tiom danĝera kiel la *Pachytylus*, tamen ĝi ne pasas sen spure. Ĝenerale la plimulto de la sinsekvaj lavangoj



Akridoj sidiĝantaj sur oranĝujon

foto : A. Benítez

daŭrigas sian vojaĝon kaj perdiĝas en la oceano; kiam ili transpasas insulon, normale ne malpli ol 20 metrojn super la tero, nur relative malmultaj individuoj falas teren. Sed, de tempo al tempo, kvazaŭ je supera ordono, amaso sidas en unu regiono, sendistinge ĉu kulturita aŭ dezerta; tiam estas vere malfacile ilin pluirigi. Eĉ se oni faligas sur ilin DDT aŭ aliajn likvajn aŭ fumajn ekstermilojn, la plimulton de la fojoj ili obstinas kaj rezistas ĝismorte. Tamen, en iuj




foto : T. Garriga

okazoj ili tuj refluas, kvazaŭ je komando, ĉiuj samtempe, eĉ mem per malpli drastaj forigiloj. Fakuloj ĝis nun ne sciis klarigi tiun konduton.

Se ili hazarde sidas sur kulturitaj kamparoj kun legomoj, fruktarboj, ktp kaj ili estas en fazo de manĝegemo, dum kelkaj horoj ili faras el prosperaj ĝardenoj kvazaŭdezerton. Sed kelkfoje ili sidas dum horoj en kultivaĵoj kaj postfluge apenaŭ estas rimarkeblaj damaĝospuroj.

En Kanarioj oni sin defendis kontraŭ ili farante bruon kaj fumon, ĉar oni kredas, ke tio pluirigas ilin. Pro dumfluga laco ili foje falas amase sur la maron; kiam tiu falo estas proksima al terbordo, ofte okazas, ke la ondoj ĵetas grandajn buliĝintajn akridarojn sur la strandon (ĉar ili sindefende buliĝas sur la maro, kun pereco de la eksteruloj, kiuj iel formas

ŝirmokorseton al la centro), kaj se estas sufiĉe varme tie, ili povas post sekiĝo refluigi kaj detrui apudajn kultivojn. Tial do fiŝistoj kaj helpantoj plenigas barkojn el tiuj flosantaj masoj kaj poste sur la strando aspergas per benzino kaj bruligas ilin, aŭ ilin subterigas en longajn fosaĵojn, se ne troviĝas bruligaĵo. Kiam ili estas tre densaj surtere, oni ankaŭ amase rikoltas kaj bruligas aŭ enterigas ilin (ekzemple, en komunumo sude de la insulo Tenerife oni kolektis ĉirkaŭ 5,000 kilogramojn, ĉar tie oni pagis po 2 pesetoj por kilogramo). Ankaŭ la agrikultura ministerio helpis per du aviadiloj, kiuj aspergis invaditajn lokojn per insekto-mortigiloj, sed ŝajne ne senteble efike, ĉar laŭ spertuloj oni bezonus almenaŭ dekoble pli densan, pli oftan kaj pli ampleksan agadon. Je la dua monato de la plagosturmado, kiam komencis fortaj pluvoj kaj aperis malvarmo, ĝi ekcedis kaj iom post iom malaperis.

Post ĉeso de la invado, inĝeniero kalkulis la damaĝojn en la insulo Tenerife. Li trovis, ke ili sumis proksimume 110 milionojn da pesetoj, kio egalas 1 milionon da sterlingoj. Ĉar la ceteraj insuloj estas malpli grandaj kaj kun malpli da delikataj kultivoj, la fakta difektado ne estis tre grava. Ni aldonu, por komparo, ke Kanarioj eksportas ĉiujare al Britujo—ĉefa kliento—tomatojn je valoro, kiu oscilas inter 8 kaj 10 milionoj da sterlingoj.

Ĝenerale, eĉ se oni povus supozi aliaĵon, ĉi tie, en Kanarioj, oni ne sentis trean naŭzemon kontraŭ la akridoj. Kiam okaze granda svarmo ĉirkaŭis kaj dumŝvebe tuŝetis kapon, vizaĝon, manojn, ktp, kelkaj sin sentis iom naŭze ĝenitaj aŭ nervoziĝis. Sed infanoj ludis per ili tute plezure



40-a Universala Kongreso de Esperanto

30.VII-6.VIII, 1955, BOLONJO, Italujo

Adreso : CIT, Piazza Nettuno 2, BOLOGNA, Italujo

Banko : Banco di Napoli, Bologna, Konto 2824

Ĝiro : Grupo "A. Tellini", Piazza Medaglie d'Oro 3,
N. 8/20620

N-ro 4

OFICIALA KOMUNIKO

Marto 1955

Honora Protektanto : La L.K.K. havas la honoron anonci, ke akceptis esti Honora Protektanto de la Jubilea Kongreso S-ro D-ro Luigi Einaudi, Prezidanto de Italujo.

Peto al Pioniroj : La L.K.K. deziras havi la nomojn kaj koncernajn detalojn de kongresanoj de la Jubilea Kongreso, kiuj ĉeestis ankaŭ la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-mer, Francujo.

Adreso de la Kongreso : Poŝtaĵoj por la kongreso nepre portu la nomon de la kongreso. Alvenas leteroj adresitaj nur al "CIT" kaj tiu instanco malfermas ilin. La kongresa

kaj pliaĝuloj nur klopodis ekstermi kiel eble plej grandan kvanton da insektoj. Anglo, kiu ĉeestis streĉan futbalan partion en Las Palmas (Gran Canaria), konstatis la fakton, ke okaze akridonubo transire dense superflugis dum 20 minutoj la sportejon, kun abunda pluvado da insektoj sur spektantojn kaj ludantojn, sed la partio daŭrigis tute normale; pri tio li poste mire kaj admire skribis en londona taggazeto.

*J. Régulo Pérez,
Kanariaj Insuloj.*

*Flaveska = flavsimila Analo(j) = jarkroniko
Obskura = malluma
Spekti = rigardi (spektaklon)*

oficejo estas en la sidejo de CIT (Compagnia Italiana Turismo).

Kongresejo : La ĉefa kongresa ejo de la Jubilea Kongreso estos la Universitato de Bologna.

Statistiko (ĝis 31 jan.) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 16, Belgujo 12, Brazilo 3, Britujo 69, Danujo 20, Finnulo 27, Francujo 170, Germanujo 79, Hispanujo 4, Italujo 201, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 37, Kanado 1, Maroko 18, Nederlando 108, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Svedujo 72, Svislando 22, Urugvajo 2, Usono 10. Sumo el 26 landoj, 900. (La nemembroj de UEA estas 22% ; la plej granda grupo de profesioj estas instruistoj k.s. 18% ; personoj sub 20 jaroj 7%).

*Nome de L.K.K.,
Mason Stuttard, K.K.S.*


Internacia Esperanto-Turismo-Centro, Parizo

organizos malmultekoste, antaŭ kaj post la *Universala Kongreso*, tre interesajn turistaŭtobusvojaĝojn tra Italujo.

Petu programon al la gvidonto :

**Angelo Lovati, Milano (629),
Via Lipari 8, Italujo**

Sciigu kiom da tagoj vi disponas



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m., 188m. P. (nur 16-III, 13-IV). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Private.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.50–23.10	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-III, Mondo Esperantista ; 4-III, Leterkesto kaj bibliografio ; 9-III, Informoj el Italujo ; 11-III, Datreveno de la naskiĝo de Torquato Tasso (11-III-1544) ; 16-III, Festivalo de la itala Kanzono en San Remo ; 18-III, Revenis printempo ; 23-III, Florenco, urbo de artistoj kaj poetoj ; 25-III, La Anunciacio ; 30-III, Gastronomio Bolonjo.

La unuan de Aprilo okazos la 500-a jubilea dissendo. Bonvenaj estos gratuleteroj kaj konstruaj kritikoj al : Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.



Ivo Lapenna —

Heroo de Montevideo

VIVO

Naskiĝis la 5-an de Novembro 1909 en Split (Dalmatio) kiel filo de inĝeniero. Finis tie gimnazion. Finis muzikan lernejon (violonĉelo) kaj juran studon en Zagreb kaj tie doktoriĝis en 1932. Praktikis ĉe tribunalo kaj kiel advokato. Dum la milito partoprenis la naciliberigan batalon en Jugoslavio. Post la milito estis nomita profesoro pri internacia juro kaj historio de diplomatio en la universitato de Zagreb. Partoprenis en 1946 la Packonferencon en Parizo kiel ekspertizisto. Pledis en 1947/48 antaŭ la Internacia Kortumo en Hago kiel advokato-konsilisto. En 1948 estis elektita membro de la Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj en Zagreb. Forlasis Jugoslavion en 1949, ekloĝis unue en Parizo kaj poste en Londono. Fariĝis membro de la "Académie Internationale Libre des Sciences et des Lettres" en Parizo kaj de la "International Law Association" en Londono. Nuntempe estas honorariata kunlaboranto de la franca scienca institucio "Centre National de la Recherche Scientifique".

Esperantista kariero

Esperantistiĝis kiel studento en 1929 kaj fondis en la sama jaro la societon "Akademia Esperantista Klubo". Estis ĝia prezidanto ĝis la eksplodo de la milito. De 1937–1949 estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo (post la milito : Federacio). De 1938 Komitatano kaj Estrarano de UEA. Ekde 1949 konstanta sekretario de la Internacia Somera Universitato. Fondis en 1952 la Centron de Esploro kaj Dokumentado kaj estas de tiam ĝia honorofica direktoro. Estis elektita membro de

VERKOJ

Kroatlingvaj :—

- "Ujedinjene Nacije" (Unuiĝintaj Nacioj).
- "Historio de Diplomatio I kaj II".
- "Esperanto u 10 lekcija" (Esperanto en 10 lecionoj).

Franclingva :—

- "Conceptions Soviétiques de Droit International Public" (Sovetaj konceptoj pri internacia publika juro).
- Ĉi tiu libro estis verkita laŭ mendo de "Centre National de la Recherche Scientifique" kaj eldonita kun ties financa helpo, fare de la "Institut de Droit Comparé de l'Université de Paris".

Esperantaj :—

- "Retoriko" (nun tradukata en anglan lingvon).
- "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo".
- "La Internacia Lingvo" (nun tradukata en la francan).
- (kaj centoj da artikoloj en la Esperanta gazetaro).

la Akademio de Esperanto en 1952. Ĉeestis kiel observanto de UEA la Ĝeneralan Kunvenon de UNESKO en 1952 en Parizo, kiam estis pritraktata la Internacia Peticio kaj atingis post trisemajna klopodo ke ĝi akceptis rezolucion, kiu devigis la Kunvenon rediskuti la temon en la Sesio en Montevideo. Tie li atingis la konsultan pozicion por UEA kaj akcepton de la Rezolucio.

Karaktero, personeco

Krom elstara juristo, ankaŭ granda sportulo, muzikisto, lingvisto. Ĉiam

partoprenis ĉiajn sportojn, precipe atletikon. Heredis la muzikan talenton de la patrino kiu estas talenta pianistino. Post fino de la muzika studo ludis violonĉelon en pluraj lokaj koncertoj. Kun denaska lingva sento facile lernis kaj parolas la lingvojn italian, rusan, francan, germanan, anglan kaj krome legas plurajn aliajn lingvojn.

Du faktoroj elstaras super ĉiuj aliaj kaj difinis lian vivon kaj sorton: amego al Esperanto kaj netolero de maljusteco.

Malgraŭ vastega propra erudicio, ĉiam ŝato kaj simpatio por la simplaj homoj kaj ĉiam preta helpi al ili. Estis ĉiam en tre amikaj rilatoj kun laboristaj medioj esperantistaj kaj neesperantistaj kaj pro tio alte estimata de ili.

Aliflanke opinias la kulturan nivelon de la Movado esence grava kaj necesa ne nur por ke la lingvo plene vivu, sed ankaŭ por vekti la atenton de la gvidantaj medioj en la mondo. Tial ĉiel klopodas gajni intelektulojn por la Movado kaj antaŭenŝovi tiujn kiujn ĝi jam posedas.

Aldoniĝas al ĉiuj ecoj de cerbo kaj spirito senfina fizika eltenemo, nestingebla energio, nelacigebla labor-kapablo. (Ĉiu alia estus kolapsinta post tio kion fizike postulis de li la okazintaĵoj en Montevideo !)

Kiel oratoro li posedas voĉon orgenan, kiu neniam, eĉ en granda halo, bezonas helpon de mikrofono. Li paroladas eĉ pri gravaj sciencaj temoj kun minimumo da notoj (kiujn li tre malofte rigardas) aŭ tute sen notoj. En ĉiu okazo li disvolvas sian penson kun verva, spontana kreado

kaj samtempe perfekta regado de la temo laŭ direkto kaj proporcio de la partoj. Li prezentas tre maloftan kombinaĵon de la inspiroj kora kaj intelekta. Ĉu kiel oratoro, ĉu kiel debatanto, li apartenas sendube al la plej alte dotitaj.

John Francis iam bonhumore konjektis: "Mi estas konvinkita, ke Lapenna parolas la kroatan lingvon kun Esperanta akcento !"

Pri lia stilo Julio Baghy skribis antaŭnelonge:

"Mi tralegis la tutan Retorikon de I. Lapenna kaj ankaŭ lian sciencan duan verkon kaj mi havis kvazaŭ mirindan travivaĵon kaj enpense multfoje mi ĉirkaŭprenis nian kultur-heroon; tiuj verkoj respegulas la naturan evoluon." Efektive la verka stilo de Prof. Lapenna estas integra kun lia stilo parola: dank' al perfekta, kvazaŭ-natura posedo de nia lingvo, li ankaŭ skribas laŭ la samaj kadencoj, en kiuj li parolas. La pensoj ĉe li ricevas tiel tujan kaj senperan formon, ke eĉ longajn artikolojn li povas dikti sen bezono ilin poste revizii. Tiu suverena stilo ne hezitas alpreni novajn ekzaktajn terminojn, kiujn ĝi bezonas, sed ĉiam lin regas admirinda disciplino: la bezono tuj efiki, esti tuj komprenata (kiel parole, tiel ankaŭ skribe), kaj tio lin tenas ĉe esprimado viva, rekta, sed ankaŭ riĉa. Rutinaj parolantoj ofte, por "renkonti" la aŭskultantojn, emas fali iom post iom en tian troan simplecon, kiu fine kastras ilian penson, sed Ivo Lapenna respektas sian publikon kaj fidus ĝian komprenpovon. Dank' al tio li vestas ĉiam adekvate sian penson kaj—li ĉiam "portas kun si" la aŭskultantojn kaj legantojn de liaj vortoj.


V.R.

S-ino LJUBA LAPENNA

Ljuba Knjažinskaja Lapenna naskiĝis en Siberio kiel filino de rusa militkaptito. Kiel infano venis al Kroatujo, kio fariĝis ŝia dua patrujo. Laboris kiel sekretariino en diversaj oficejoj, i.a. ĉe granda kroata gazeto. Partoprenis dum la milito la naci-liberigan batalon en Jugoslavio. Estis grandega apogo de la edzo en tempo de malprospero; neniam perdis la kuraĝon en la penplena vivo de rifuĝintoj. Estas nuntempe oficistino de UEA, nome, sekretariino de la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj laboras kun la direktoro en ĉiuj eblaj horoj de la tagoj kaj noktoj.

Plenumas kun ĉiam gaja mieno ĉiujn taskojn de sekretariino, dommastrino, edzino; neniu precize komprenas kiel, sed oni flustras ke la sekreto estas ke ŝi havas ne du, sed dek manojn! Estas silenta heroino, unu el la tre malmultaj, kiu kapablas plenumi la altajn postulojn de la laborkapablo kaj laborrapideco de sia energia direktoro, kiu ne laciĝas dikti seninterrompe dum dekses horoj, se la cirkonstancoj tion postulas. Kiu miros, ke ŝi bezonis ripozon post la pli ol elĉerpaj multmonataj preparlaboroj por Montevideo . . . ?

V.R.



Don Kihoto : Ha, jen la multbraka monstro ! Ni iru lukti kun ĝi denove !

Sanĉo : Sed atendu : eble ĝia bildo iom solviĝos kiam venos plena tago !

Esperanto en la Itala Radio

LA kontakto de Esperanto kun la itala radio datiĝas jam de 1925a, kiam de la Roma stacio estis dissendata kurso kun bona sukceso. Poste aliaj kursoj okazis en 1929a kaj 1930a ĉe la stacio de Torino.

De tempo al tempo el la diversaj italaj stacioj estis disradiataj ankaŭ paroladoj en aŭ pri Esperanto, informoj, intervjuoj, kantoj en Esperanto kaj estis eĉ elsendataj per televizio scenoj filmitaj okaze de naciaj kongresoj kaj de aliaj manifestacioj.

Sed la plej gravaj laŭ la amplekso, la enhavo kaj la reguleco, estas la elsendoj, kiuj, inaŭguritaj en 1935a, kun la escepto de la milita periodo, ankoraŭ nun okazas en Romo per du stacioj je mallongaj ondoj.

La enkondukon de nia lingvo oni ŝuldas unue al la organizado de la 27a Universala Kongreso en Italujo kaj due al la rimarkinda aktiveco de la esperantistaro. Por la aranĝo de tiu internacia kunveno la Ŝtata Turisma Organizo, kiu helpeme strikte kunlaboris kun la L.K.K., disponigis al ĝi du elsendojn dekminutajn ĉiusemajne, por propagandi la okazontan esperantistan feston.

La esperantistaro montriĝis vere tre aktiva, kaj la amaso da skribaĵoj tiom impresis la kompetentan instancon, ke estis decidate plu uzi Esperanton por la turisma propagando, kaj ĝi definitive eniris en la aranĝon de la "Turismaj kronikoj".

Verŝajne kelkaj malnovaj esperantistoj memoras la antaŭmilitan oran epokon de la Esperanta Fakto de la Roma Radio, kiam estis eĉ sendataj

al la petintoj la tekstoj de la paroladoj, la programo en Esperanto de la italaj elsendoj per mallongaj ondoj (monata 60-paĝa libreto), luksaj eldonaĵoj riĉe ilustritaj, kaj estis aranĝataj konkursoj, kiuj havis kiel premion vojaĝon al Italujo kaj dekkvintagan restadon kun tuta pensio ĉe unuarangaj hoteloj.

Mi diris, ke la aktiveco de la tiama samideanaro estis vere rimarkinda; tion pruvas la fakto, ke antaŭ la milito oni havis la adresojn de pluraj miloj da personoj, kiuj almenaŭ unu fojon skribis al la Radio.

La impona laboro ne ĉiam facila kaj kelkfoje eĉ tro peza (verkado, tradukoj, korespondado, ekspedado de tekstoj, de turismaj eldonaĵoj kaj de programoj) estis plenumata nur de malmultaj personoj, kiujn en tia preskaŭ superhoma penado subtenis nur la fervoro kaj la entuziasmo por nia lingvo.

La unua periodo, kiu daŭris de la 22a de Marto 1935a ĝis la 31a de Aŭgusto 1942a, fermiĝis per la jena rezulto: 570 elsendoj, kiuj ampleksas pli ol 120 horojn kaj proksimume 3,000 paĝojn da teksto.

En tiu periodo, kaj precipe de Marto 1935a ĝis Majo 1940a, oni ricevis proksimume 25,000 korespondaĵojn.

Poste okazis la paŭzo de la milito kun ĝiaj detruoj.

La 16an de Junio 1950a komenciĝis la nova periodo. En ĉi tiu dua periodo la elsendotempo estas iom pli longa: du disaŭdigoj dudekminutaj ĉiusemajne. Mi deziras atentigi pri la graveco de la afero: temas pri monata elsendado de

preskaŭ tri horoj. La rekomenco estis salutata de la samideanaro per entuziasmaj amasaj alskriboj, kiuj altiris la atenton de la nova estraro kaj naskis en ĝi ian simpation por nia lingvo, al kies disvastigado klopodas tiom da idealistoj.

Do la Ĝenerala Direkcio de la poreksterlandaj radio-elsendoj metis je nia dispono tiujn disaŭdigojn, en kiuj oni povas pritrakti ĉiuspecan temon nepolitikan.

Kion programi? Kompreneble oni ne povas paroli nur pri Esperanto kaj ĝia movado; tion eĉ ne faras la tiucelaj gazetoj, kiel la revuo de UEA, "Heroldo de Esperanto" kaj la diversaj aliaj. Sekve oni ĉerpis el ĉiuj fontoj ideojn kaj temojn, oni petis la kunlaboron de ĉiuj gesamideanoj, por ke ili sciigu siajn dezirojn, siajn ŝatojn, siajn preferojn. Iliaj indikoj multe helpis al la pretigo de la programoj. Kompreneble la gustoj estas tre diversaj kaj kelkfoje kontrastantaj inter si. Tamen, laŭ la eblecoj, oni klopodis kontentigi ĉiujn. Pro tio la programoj, frukto de ne ĉiam facila cerbumado, estas tre variaj kaj reprezentas iumaniere la dezirojn de la aŭskultantoj, multaj el kiuj aŭ vizitis aŭ intencas viziti Italujon, aŭ deziras viziti ĝin nur spirite kaj revii, aŭskultante la priskribon de la italaj lokoj, kaj la dolĉajn kantojn, tiom helpemajn al la revado.

Se oni donas rapidan rigardon al la programoj elsenditaj nur en ĉi tiu dua periodo (la 1an de Aprilo okazos la 500a), oni vidas, ke oni traktis temojn pri turismo, folkloro, arto, muziko, literaturo, scienco k.t.p. Al tiuj temoj estas aldonataj tiuj, kiuj rilatas speciale al Esperanto; kaj, krom la elsendoj plene dediĉitaj al la lingvoj kaj al la movado, preskaŭ en ĉiuj aliaj

estas disradiataj la plej lastaj informoj, aŭ recenzoj de novaj libroj, aŭ respondoj al la aŭskultantoj. La Universala Kongreso estas vaste propagandata per la legado de ĉiuj komunikaĵoj kaj bultenoj kaj de interesaj artikoloj; ankaŭ la informoj kaj programoj de aliaj kongresoj kaj kunvenoj ricevas sian konvenan lokon, kaj tio laŭ la sciigoj, kiujn oni ricevas.

Kelkaj petis, ke oni dissendu ankaŭ teatraĵetojn. La kunlaborantoj bedaŭrinde ne estas aktoroj kaj pro tio oni evitas dissendi programon, kiu bezonas specialan prezentokapablon; tamen kelkfoje, fidante pri la indulgemo de la gesamideanoj, oni kuraĝis prezenti ankaŭ teatraĵetojn aŭ romaneton scenigitan. Ekzemple, skeptike pri la rezulto, oni komencis disradii en scenigita maniero la unuajn ĉapitrojn de "Pinokjo" kun la intenco resumi kaj elĉerpi la libron post kelkaj dissendoj; sed tiu porinfana programo vekis tute neatenditan intereson ne nur ĉe la infanoj, sed ankaŭ ĉe la plenkreskuloj. Radio Roma ricevis multajn kaj oftajn gratulojn, kiuj kuraĝigis daŭrigi laŭ scena prezentado la tutan libron. En estonteco, post tiu kuraĝiga rezulto, oni intencas enondigi de tempo al tempo ankaŭ novelojn scenigitajn kaj kun akompano de muziko, kiel kelkfoje oni jam faris. Do oni povas diri, ke nur la opero kaj la opereto ne estas dissenditaj, kaj estas bone komprenebla la kialo; tamen nunjare oni komencis fari ion proksimuman: oni resume prezentas la rakonton de iu opero kaj poste aŭdigas la diskojn en itala lingvo de kelkaj ĉefaj pecoj antaŭitaj de la Esperanta traduko.

Kiel reagis la aŭskultantaro? Laŭ la informoj ricevitaĵoj oni scias, ke la

laboro estas sekvata de multaj personoj ; sed nur malgranda parto da ili skribas. Kompense oni konstatis kun granda ĝojo, ke la esperantista popolo estas komprenema kaj ne postulema ; ĝi ordinare kontentiĝas kaj gustumas entuziasme la varian programon prezentatan. Oni ricevas skribojn plenajn de tiom da dolĉaj kaj karaj esprimoj, ke oni restas kortuŝita. Kaj la skribantoj estas el ĉiuj sociaj tavoloj kaj el ĉiuj Eŭropaj landoj, el Azio, el suda kaj centra Ameriko, el Sudafriko, el Novzelandoj kaj unu eĉ el Vladivostok en orienta Rusujo. La aŭskultado bedaŭrinde ne ĉiam estas bona, kaj kapricaj estas la ricevoaparatoj ; tamen plurfoje oni raportas, ke oni bone aŭdas eĉ en malproksimaj regionoj. Kutime oni respondas al ĉiuj skribe ; tamen de tempo al tempo oni legas fragmentojn de korespondadoj kaj respondas ĉe la mikrofono. Tiamaniere oni deziras esprimi per voĉo la dankeman senton al ago, pri kiu la prelegantoj prave ĝojas, kaj estigi preskaŭ dialogon kun la konata aŭ nekonata malproksima aŭskultanto. Tiaspeca kunlaboro estas ŝatata de la gesamideanoj.

Nuntempe la korespondado bedaŭrinde ne estas abunda ; pro tio mi permesas al mi adresi specialan alvokon :

Karaj geaŭskultantoj, en ĉambro surda kaj senresona la prelegantoj parolas antaŭ malvarma mikrofono, kaj ŝajnas, ke iu mistera estaĵo forrabas iliajn vortojn, dum ili eliras el la buŝo kaj lasas ilin iom skeptikaj, dubemaj, scivolemaj. Ĉu iliajn vortojn formanĝis tiu senkompata mistera estaĵo, aŭ simpatie kaptis ilin akceptema orelo ? En la surda ĉambro tion ili ne kapablas diveni. Estas vi, kiuj devas sciigi tion al ili per viaj kritikoj kaj sugestoj. Ili bezonas legi viajn impresojn, kiuj estas por ili netakseblaj kuraĝigoj al plua kaj pli bona laboro, kaj . . . jen la ĉefa afero : viaj skriboj pravas al la Estraro de la Radio, ke ilia laboro, iliaj paroloj ne perdiĝas tra la aero ; sed ke ili atingas atente aŭskultantajn orelojn, viglajn intelektojn kaj sentemajn korojn.

Luigi Minnaja

kunlaboranto ĉe la Roma Radio.

Rim' por Reto

Jen poeto en la reto !
Por legantoj nova ĝuo.
Ĝin anoncis la revuo :
Helpe redaktoras Reto.

La "Kvaropo" sur la breto
Kantas kun tre ritma bruo :
Jen poeto en la reto,
Ne dronigu lin la gluo !

De l' tekniko la konkreto
Estu por li sava buo,
Tamen ne sekiĝu fluo
De per-versa interpreto !

Jen poeto en la reto !

C. Gicquel.

Dilemo

Al rimsaluto kion diri ?
Vi petas min poemi plu
kaj ne pereu en la glu',
nek per tondilo min traŝiri

en akcidenta *harakiri*.
Dum urĝas min laboroj—fu !—
al rimsaluto kion diri ?
Vi petas min poemi plu.

Ĉu porti lignon, sed sopiri
al dolĉa florplektado—ĉu ?
Pli sobre mi konstatas : Nu,
mi min enjungis—devas tiri !

Al rimsaluto kion diri ?

Reto Rossetti.



Enigma Konkurs N-ro 96

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 89 Av. du Sacré Coeur, Brussel-Jette, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono interncia.

Solvoj :

N-ro 213 : Li ne havas kapon de ministro. kokluŝo - kariolo - grenado - maleolo - malhela - notario - fervoro - bazalto - kalsono - fenkolo - geranio - despoto - parodio - anonima - ferdeko - rezervi - normala - sofismo - kelnero - societo - kapsulo - partero - ombrelo - ankoraŭ.

N-ro 214 : Tio, kio estas, estas ; tio, kio ne estas, estas ne ; tio, kio ne estas, ne estas tio, kio estas ; nek estas, tio, kio estas ; tio, kio ne estas.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 92-a konkurso : S-ro E. Windeballe (Dan) 118, S-ro G. F. A. Milanowski (Germ) 116, S-ro Ch. Brunet (Franc) 115 p.

Enigmo N-ro 217 : El la literoj de ĉiu paro da vortoj formu novajn naŭ-literajn vortojn, kies komencliteroj formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. grafo + suna ; 2. naski + peso ; 3. taŭro + fago ; 4. aromi + akno ; 5. primo + alie ; 6. tigro + alko ; flati + moto ; 8. kanti + paso ; 9. rento + kelo ; 10. bruna + mito ; 11. frato + semo ; 12. basto + lumo ; 13. liano + armi ; 14. larvo + teni ; 15. nigre + aŭlo ; 16. venko + tiel ; 17. kroni + kato ; 18. rento + vane ; 19. parto + sofo ; 20. amelo + nodi ; 21. klano + urno ; 22. mirto + tien ;

23. talpo + tuso ; 24. densa + roko ; 25. bordo + arto ; 26. kaŭri + arao ; 27. tiaro + naso.

Enigmo N-ro 218 : Ĉiu paro de la ĉi-supraj klarigoj difinas du kvar-literajn vortojn aŭ radikojn (kun R), skribitajn per la samaj literoj sed en inversa sinsekvo. La duaj literoj de la unuaj vortoj (do ankaŭ la triaj de la duaj vortoj) formas, en la donita sinsekvo esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof (iomete ŝanĝita).

1. muzika amplekso de iu voĉo (R) - malkonstipi (R) ; 2. plenkrede - doni bonan ekzemplon (R) ; 3. altvalore - malkorektaĵo (R) ; 4. malmilda - kurba ; 5. ventodirekto (R) - embaras-iĝi (R) ; 6. maso da materio (R) - parto de pafilo (R) ; 7. kaŭzanta putriĝon (R) - fiktiva monunuo (R) ; ŝirmo (R) - malakcele ; 9. malaperigi en si (R) - ilo por forigi malpuraĵojn (R) ; 10. gajniga koloro en kartludo (R) - kompleta ; 11. incite - provizi iun per ĉio necesa (R) ; 12. tago (R) - teatra verko (R) ; 13. malpeza vel-ŝipo (R) - frukto (R) ; 14. rabobesto (R) - naturfenomeno (R) ; 15. insulto (R) - dependa de la sorto ; 16. tufo da haroj - frukto (R) ; 17. mult-nombra kolekto (R) - identa ; 18. bruligebla substanco (R) - supraĵe skrapdifekti (R).

Ensendis S-ro Jules Escare (Francujo).

Raportoj pri la Belarta Konkurso, 1954

POEZIO

En la Konkurso de 1954 partoprenis, en la *Originala Branĉo*, 14 poetoj kun 35 kontribuoj, en la *Traduka Branĉo* 9 poetoj kun 17 kontribuoj: oni memoros ke, la pasintan jaron, konkursis en la unua fako 17 poetoj kun 33 pecoj, en la dua 16 kun 33 pecoj—kaj oni rimarkos, ke la traduko ŝajne malpli allogis ĉi-jare niajn talentajn versamantojn. Sed la ĉefa diferenco kun la antaŭaj konkursoj estis la sindeteno de niaj Skotaj amikoj, precipe de S-roj W. Auld kaj J. Dinwoodie; eble, ke, sataj je laŭroj, ili deziris lasi kampon libera al novaj batalontoj... (provizore, mi esperas!).

La juĝantaro konsistis el S-roj Haugen (Norvegujo), L. Hernandez (Hispano), La Colla (Italo), Szilágyi (Hungaro) kaj mi (Franco).

Inter la konkursaj pecoj, kelkaj estis tre malaltnivelaj, precipe tiuj, kiuj estis verkitaj en liberaj versoj; ŝajne iliaj aŭtoroj ne konscias, ke tiu libera formo estas la plej malfacila el ĉiuj kaj devas kompensi per aparta denseco de la esprimo kaj aparta brileco de la bildoj la neregulecon de la ritmo. Kaj pri la traduka poezio, mi permesas al mi rememorigi, ke, se la originalo estas rima, ankaŭ rima devas esti la traduko: rondelo aŭ soneto senrimaj estas kiel kolbaso sen mustardo, io perfekte sengusta.

La unuan premion de la *Originala Poezio* gajnis S-ino Eli Urbanová, el Praha, kiu estis jam premiita lastan jaron; la poemon "Antaŭ spegulo" oni jam povis legi en la Novembra n-ro de ĉi tiu Revuo, p. 296,* kaj oni

* Oni atentu la korektojn (Decembra n-ro, p. 329)!

povis tie ŝati la arton de tiuj sapfaj strofoj, elvokantaj, iom oblikve kaj alude, la koketan melankolion de Romana matrono, kiu vidis mortisian preferatan gladiatoron kaj el tiu memoraĵo faras al si ian pli pikantan ornamaĵon.

La dua premio iris egale al S-ro Claude Piron (el Belgujo) pro lia poemo "Premsonĝo" kaj al S-ro Poul Thorsen (el Danujo) pro lia poemo "Frua mateno en Sarajevo". La unua estis publikigita en tiu ĉi Revuo en Novembro 1954 (p. 296), kaj certe la legantoj rimarkis la drastan insiston de la ritmo kaj de la rimoj, finaj aŭ internaj, kaj la profundan emocion de la poeto. La dua aperis en la Januara n-ro, 1955 (p. 19). Ĝia prezento de pitoreska sceno el orientaj moroj malfruiĝintaj en Eŭropa angulo, estas potence elvokiva.

La kvaran premion gajnis ankoraŭ S-ro Thorsen, kun la poemo "Fenestroj", revo de nokta vaganto tra la stratoj de granda urbo, revo pri la okazaĵoj kuŝantaj malantaŭ la lumitaj fenestroj. Originala, bonvena strofo. (Ankaŭ en la Jan. n-ro, p. 19).

La lastan premion dividis inter si S-ino Eva Suchardová (el Praha) pro sia "Aktorino konfesas", kaj F-ino W. M. Smit (el Nederlando) pro sia "Bela vetero, sinjoro!". Ambaŭ estas belaj, virinaj poeziaĵoj, kun vibranta emocio kaj iom malpli perfekta formo.

En la *Traduka* parto, la unua premio estis aljuĝita al S-ro P. Thorsen, pro lia traduko de "Leprulo", verko de H. H. Sedorff; aperinta en ĉi tiu Revuo (Nov. 1954, p. 297); ĝi montras rimarkindan koncizon kaj

ellaboritecon, kaj redonas admirinde la energion kaj dramecon de la originalo.

La duan premion ricevis F-ino Magda Carlsson (Svedujo), tradukinte el J. O. Wallin belan pecon "Anĝelo de l' morto"; ĝi aperis en ĉi tiu Revuo (Decembro 1954, p. 328). Klasikaĵo, kun kelkaj memoraĵoj el Horacio kaj Dante, ĝi prezentis neordinarajn malfacilojn: ilin ĉiujn F-ino Carlsson bele venkis. Laŭ mia persona gusto, ŝia traduko estas unuaranga.

La trian premion akiris S-ro Jean Delor (Francujo) per traduko el J. Prévert "Kanto el la sango": malfacila teksto, pro la vortludoj kaj vortaludoj kutimaj en la versoj de Prévert; ĝi estis tre bone tradukita, en formo adekvata al la originala.

Nome de la juĝantaro mi gratulas ĉiujn premiitojn, kaj mi esperas, ke la ne-premiitoj ne perdos la kuraĝon, sed montros sin, en la venonta jaro, ankaŭ indaj je honorcitado: nian simpation kaj dankon ili cetere jam havas, ĉar nenio estas pli bonfara al nia lingvo kaj literaturo, ol tiu fervora strebo al la poezia belo.

G. Waringhien.

PROZO KAJ DRAMO

Post la bela rezulto de la proza branĉo de 1953, kun granda intereso ni atendis la konkursaĵojn de la lasta B.K.—La alvenintaj 26 konkursaĵoj de la proza branĉo ĝenerale ne plenumis la esperojn pri sensacia novo en la proza literaturo. Malgraŭ tio estus maljuste konkludi pri definitiva falo de la nivelo: la ĝenerala kvalito de la premiitaj kaj eĉ de la nepremiitaj verkoj kontentigis la kutimajn postulojn. Nur la forta rebrilo de la pasintjara proza konkurso paligas la lumon de la nunjara.

La komisiono distingis per la unua premio en la branĉo *Originala Prozo* la kontribuaĵon de Jean Delor: "Um-sennah' kaj Um-sentin'." La verko estas ekzotika fabelo kun viglaj koloroj kaj rapida ritmo, lirika senso kaj humoro.


La duan premion ricevis la rakonto "Fraŭlina pudoro similas al oro" (aŭtoro: Gerald C. Jervis). La novelo estas respektinda peco de la miniatūra arto, kaj la vigle serpentuma stilo de la verkinto klare sensigas la vibrojn de la revu-teatra atmosfero.

Pripensigan problemon garnas la noveleto de Marjorie Boulton: "La heroo". La novelo lerte kaj koncize konkretigas la pacisman volon de la verkinto kaj la psikologian klarigon pri la milita "heroeco". La rakonto povus esti iom pli proporcia. Tiu ĉi konkursaĵo estis distingita per la tria premio.

La kvara kaj kvina premioj venis al la sama aŭtoro: Ŝtepan Urban, pro la konkursaĵoj "La lasta tago" kaj la "Idilia golfo". La unue menciita estas kvazaŭ proza poemo pri la lasta tago de la homaro, kiam "Tempo kaj Spaco kunfandiĝas", kaj la perfekte bela lingvaĵo sensigas la profundon de la bildo. Ankaŭ la laste menciita mallonga novelo estas el la amfibia speco de lirika prozo kaj atestas same pri la ne-ordinara stila senso de la aŭtoro.

Inter la ceteraj konkursaĵoj troviĝis kelkaj, kiuj meritis altan kvalifikon, sed precipe pro troa manko de epika karaktero ili ne atingis premiitajn lokojn.

La *Drama Branĉo* klare malprogresis. Neniu el la konkursantoj povis plenumi la komunajn postulojn de la literaturo kaj la scenejo. La komisiono, konstatinte, ke inter la



Novaj Libroj

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵn ni nur mencias.

* = *ricevebla de U.E.A.*

***Rozoj kaj Urtikoj.** Poemaro tradukita kaj originala de Poul Thorsen. 117 paĝoj, bindita. Eldonis Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago, 1954. Prezo 11ŝ. 6p.

Estas devo de la poeto fari sian lingvon unika. Profitante la eblojn kaj ekspluatante la potencialojn, li kreas idiomon aŭtentikan kaj trafan, kies akiroj poste penetras en la prozon. Dum periodoj, kiam oni sentas dubon pri la artaj kapabloj de la lingvo, la poetoj, kiel ankaŭ la prozistoj, havas la taskon legitimi ĝin per triumfa demonstracio. Tiaj krizoj okazas ripete dum evoluo de la

kvar pli bonaj verkoj, tri apartenas al la nomo de Antoni Seemann, decidis (kun la supra konsidero) doni nur unu premion en tiu fako. La premion ricevis do la suprenomito pro la flua kaj bonstila, prezentebla teatraĵeto "Korespondu". Kun laŭdo oni distingis liajn du ceterajn, sam-nivelajn, sed nuance malpli fortajn drametojn "La spirito mokas" kaj "Mi esperas", kaj la literature pretendeman, sed por prezentado malpli konvenan versdramon de Marjorie Boulton: "Lisio".

Entute: ĝuste en tiu branĉo ni atendas kun streĉo la aperon de novaj talentoj kun novaj diraĵoj.

F. Szilágyi,

sekretario de la Belarta Konkurso, 1954.

naciaj lingvoj, precipe ĉe lingvo heterogena, kiel la angla, kiu spertis tian malaplombon en la jarcentoj 14-a, 16-a kaj nuna. Tiam aperis Chaucer kaj Shakespeare por siavice levilalingvon al unika artinstrumento (la hodiaŭa krizo de la angla lingvo estas pli komplika).

Tiun demonstracian rolon por Esperanto faris unue Zamenhof (por la lingvo entute) kaj poste (aparte en la poezio) Miĥalski, Kalocsay kaj Kurzens. Ĉiuj tri verkis poemojn, kiuj eksponas la proprajn, elastajn eblojn de nia lingvo. La vortformojn pli kuraĝajn ili ordinare metas en fokusajn punktojn de la verso: sur ĉefakcenton aŭ en rimlokon, por ke la versoj povu ilin porti aŭ, pliĝuste, por ke ĉi vortoj mem portu la version al pli alta tensio kaj ekzalto. Tio parenteze klarigas kial en la nuna epoko de nia poezio la senrimaj versoj preskaŭ ne havas rolon.

La nova potenco tiel akirita sin ekzercis ĉe tradukado de poemoj el la naciaj lingvoj, inkluzive de poemoj "netradukeblaj" kiel *Infero*, *Peer Gynt*, kaj la *Sonoriloj* de Poe, ĉar netradukeblon la lingvoamanto ne agnoskas.

La pionira laboro de Kalocsay konkeris vastan teritorion, kiun povas esplori la postvenantoj. Tio jam okazas. Kaj en tiu kadro estas konvene konsideri la poemaron de Poul Thorsen.

Thorsen estas inteligenta kaj sentema homo, kiu lernis paroli

Esperanton vive kaj plastike en la plej bona lernejo : la medio de SAT dum la epoko de Lanti. Inspirite de Kalocsay kaj propriginte al si la poetikajn rimedojn liveritajn de tiu kaj Waringhien, Thorsen aplikis ilin unue al tradukado de poemoj kaj poste al originala poezia kreado. La rikolton ni vidas en la 68 paĝoj da tradukoj kaj 49 paĝoj da originaloj, kiujn ampleksas la nuna volumo.

Pri la kolekto oni povas ĝoji kaj entuziasmi. La tradukoj de poemoj danaj kaj eskimaj (kun unu norvega) estas faritaj tiel trasente kaj tiel virtuoze, ke oni neniom dubas, ke ili respegulas inde la originalojn. La okulo kaj cerbo tiel facile tradancas ilin, ke oni sentas, ke Thorsen plene obeis la konsilon de Eŭgeno Lanti : "La verkisto devas peni, por eviti penon al la leganto".

Ŝajnas ke la tradukinto, anstataŭ elekti facilajn konkerojn, sin gvidis unuavice per la prefero, kaj tial prenis, interalie, kantojn kaj spritajn eposetojn, kiuj vere streĉis lian talenton. Tia principo de elektado estas miaopinie la sole inda, kaj ĉi tie ĝi donas al ni ĝuan regalon kaj rivelan sortimenton el la dana poezio, pro kio amiko Thorsen estas forte gratulinda. Min aparte impresis la eskimaj kantoj kaj la tri profunde sincer-simplaj poemoj de Gustaf Munch-Petersen.

La originala parto konsistas pliparte el poemoj facilepezaj, sed ili estas prezentitaj kun tia trafa artismo, ke ili vekas nian admiron dum ni ĝuas la petolan enhavon. Tamen ankaŭ pli seriozaj ne mankas : Al Josephine Baker, Frua mateno en Sarajevo, Matena distriĝemo. Thorsen, uzante la avantaĝojn de esperantisteco, vigle vojaĝis, kaj ĉu en Bulgarujo, en Serbujo aŭ en Hispanujo, li trovas trafajn temojn

por siaj spritaj versoj. En poemo pri Verona : *La itala trikoloro*, li provas tercinojn, sed maltrafas la vastan kaj subtilan svingon de tiu formo, ĉar li faris punkton post la verstrioj anstataŭ ofte transpaŝi.

Sur p. 18 mi trovas *balancigas* anstataŭ *balancas*, sur p. 32 *ŝprucita* anst. *aspergita* kaj sur p. 108 *sterni* estas uzita netransitive. Ĉar Thorsen estas lingve tre kompetenta, tiuj eraretoj estas atribuendaj, ne al la nescio, sed al nesufiĉa arta konscienco (cetere en ĉiu okazo la solvo ŝajnas facila). En *Knabinoj en Hispanio* aperastrifoje *bel* forĝita al substantivo. Tio estas envere kaŝita elizio de la adjektivo, kaj estus pli honeste elizii ĝin malkaŝe, sen apostrofo, laŭ la konsilo de Kalocsay. Krome mi notis sur p. 101 *rakedoj* anstataŭ *raketoj* kaj sur p. 17 *tartaroj* anstataŭ *tataroj* (Tartaro estas Infero).

Sed tiuj malmultaj ĉikanetoj ne detenu aĉetontojn de tiu ĉi plaĉa kaj valora libro. Des pli, ke ĝi estas bele presita kaj bindita kaj portas vinjetojn de Børge Hamberg tiel ĉarmajn kaj divershumore konvenajn, ke niaj eldonistoj kaj redaktoroj devus tuj atenti pri ties ilustra talento.

William Auld prezentas la poemaron per simpatia enkonduko kaj brila rondelo.

R. Rossetti.

Intersteno de F. de Kunovski. Gvidilo en Esperanto. Kvara eldono, verkita de Heinrich Fries. Eldonejo Tutmonda Intersteno-Asocio ; 20 × 15 cm., 8 paĝoj, prezo 3 rkp. aŭ egalvaloro.

Intersteno, evoluo de la sistemo stenografia "National" de du fratoj Kunovski, prezentas aron da valoraj avantaĝoj kontraŭ aliaj sistemoj. La



desegnis D. Wranka

Esperanto devis venki, ĉar troviĝas nenio por kontraŭpezi ĝin !



Lapenna ĉe Unesko

Ni scias nun pri l' tuta epopeo :
kiel, sub ĉia baro kaj opono,
li ŝiris el la faŭko de pereco

la venkon, per potenco de la kono
kaj vervo de l' obstino. Li ĝin prenis
per rajt' natura, kiel pandiono

la salmon ; kaj, se tamen iom svenis
la fortoj pro la longa streĉo dura,
la ardo de l' animo lin subtenis.

Li, en kiraso de l' kuraĝo nura,
kiu penetris en la bastionon
kaj ĉiujn pelis al paniko kura,

por nova cel' nun levas klarionon.
Ho, se lin nur apogos la armeo,
ni povus jam sieĝi Babilonon

por granda, fina venko de l' Ideo !

R. Rossetti

Pandiono = la mara aglo

recenzanto, lerninte plurajn sistemojn inter la jaroj 1905 kaj 1910, fariĝis aktiva ano de la National-stenografio kaj uzas ĝin ankoraŭ kun sama ŝato kiel iam. Moderna homo devas koni stenografion. Ekzistas aro da sistemoj, ĉiu kun la prefero kontraŭ alia. La Intersteno kunigas maksimumon da bonaj eroj kaj estas facile aplikebla je ĉiuj lingvoj. La Tutmonda Intersteno-Asocio akcelas plian disvastiĝon de la sistemo, je kio kontribuas la zorge verkita gvidilo.

H.J.

Pri la Spirita Scienco de Martinus. La Spirit-Scienca Instituto de Martinus, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo.

Folio, prese kaj lingve bona, kiu tiras atenton sur la vivsistemon de dana filozofo.

***Heroldo de Esperanto**, duonmonata Esperanto-gazeto 4-paĝa en granda ĵurnal-formato sur glata papero. Jarabono 10.50 guldenoj, abonebla ankaŭ duonjare. Eldono Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

La simpatia gazeto de Teo Jung, fondita en 1920, estas nun en sia 31-a jaro de aperado. Ĝi logas per sia sperta ĵurnalismo, la vigla informado pri aferoj Esperantaj kaj ĝeneralinteresaj, kaj la plaĉaj bildoj. Tonon al la enhavo donas la afabla personeco de la redaktoro ; ne mankas ankaŭ fako bonhumora. La simpla, modela lingvo respegulas la bezonojn de la varia, aktuala vivo.

Sankta Francisko el Assisi kaj la Tria Ordeno Sekulara. 14 paĝoj, 12 × 8.5 cm., prezo 2 por 1 rkp. Havebla ĉe Itala Katolika Esp-ista Unio, Via Rovereto 6, Verona, Italujo.

Korekto. La prezo de bindita ekz-ro de "Legu kaj ridu" estas 7ŝ. plus afranko, ne 6ŝ., kiel dirite en la januara n-ro sur p. 23.



Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Eichholz. Al Ges. Rüdiger Eichholz, Toronto, Ont., Kanado, je 4 decembro, 1954, unua infano, filo, nomita Alko.

Martínez. Al ges. Salvador Martínez, Tabernes de Valldigna (Valencia) Hispanujo, tria filo, José Vicente.

Régulo Pérez. Al Ges. Carmen kaj Juan Régulo Pérez, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, je la 18a de Jan., filino Isabel, fratinino por María kaj Ana.


Sly. Al Ges. Kenneth kaj Sybil Sly (fraŭlina nomo Reed), de Letchworth,

Anglujo, filino Franciskino Violeto je la 18-a de Januaro.

Jubileo. Pioniro de E. en Barcelona, Sam-ano Frederiko Pujula y Valles organizinto de la 5a UK de Esperanto 1909, animo de nia movado, atingis 77 jarojn 12 Nov. 1954 kaj samtempe sian 50-jaran esperantistecon. Bondeziron al malnova aktivulo!

Honorigo. D-ro William Solzbacher, Akademiano, estis nomita ĉefo de la kontrolorgano ĉe "Voĉo de Ameriko" en Washington.

H. Salokannel, plej aĝa kaj plej malnova finna samideano aliĝinta al la movado en jaro 1904, emerita staciestro en Laihia, atingis 19.I.55, 75 jarojn. Ni deziras al tiu ĉi ĉiam aktiva, senlaca kaj sindona batalanto bonsanon, bonhumoron por multaj jaroj.



Nekrologo

Delor. Ni ĵus kun doloro eksciis, ke Jean Delor (kies ĉefpremia novelo aperis en la januara n-ro) subite mortis en Sisteron, Svislando, je la 3-a de Februaro.

★ ★ ★

Partridge. Robert W. Partridge, el Kilbirnie, Skotlando, del, de UEA, mortis 29.12.54.

★ ★ ★

Bullivant. S-ro H. J. Bullivant, el Lancing, Sussex, en Decembro, 1954.

★ ★ ★

Dworschak, Karl, D-ro, ĝenerala poŝtdirektoro aŭstria, honoro prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio, Honora Membro de UEA, neatendite forpasis post grava pulmo-malsano, la 3an de Februaro. Pro malfrua alveno de tiu ĉi informo, nekrologo aperos en la sekvonta eldono de *Esperanto*.

Gravan baton UEA ricevis en la Nederlanda Teritorio pro la morto de

F-ino G. S. Penterman

dumviva membrino de UEA en la aĝo de 65 jaroj.

Esperantistiĝinte en 1906, ŝi estis kunfondantino de UEA kaj subtenis ĝin malavare je multaj diversaj manieroj. Same ŝi faris tion por la loka movado en Rotterdam, precipe por la societo "Merkurio", kiun ŝi kunfondis en 1906. Kvankam ŝi parolis multajn fremdajn lingvojn i.a. la danan, svedan, norvegan, suoman, italan, francan, anglan kaj germanan lingvojn, ŝi jretrovis en Esperanto parton de sia vividealo kaj pro tio estis kara amikino de multaj eksterlandaj gesamideanoj.

La 21-an de Januaro ŝi estas cindrigita en la krematorio "Westerveld". La eksterlandaj geamikoj de F-ino Penterman bonvolu konsideri tiun ĉi komunikon kvazaŭ al ili persone direktitan, ĉar al ili eliris ŝiaj lastaj plej koraj sentoj.

Ĉiuj, kiuj konis ŝin, rememoros tiun ĉi altspiritan samideaninon kun granda respekto.

J. Telling,

Ĉefdelegito de UEA en la Nederlanda Teritorio

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 269

1an de februaro 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de januaro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de januaro 1954 :—

	1954	1955
Asociaj membroj ..	651	388
Individuaj membroj :		
MJ	425	278
MA	2174	1539
MS	443	350
Patronoj	6	4
DM	266	280
HM	56	57
	3370	2508
	4021	2896

DELEGITOJ

Aŭstralio

Sydney (N.S.W.). FD (Arto) : W. Chandler, 57 Northcote Street, Crow's Nest.

Britujo

Kilbirnie. D : vakas.

Finlando

Kemi (Lapin lääni). D : U. Rautiainen, Keskuspuistokatu 19. Tel : 2160.

Francujo

Annemasse (Hte. Savoie). D : P. Guillot, Cours IVe République, Gaillard.

Chavaniac-Lafayette (Hte. Loire). D : P. Dehan, Poŝtejestro. Tel : P.T.T.

Cholet (M. et L.). D : R. Panchèvre, Cité Batignolles, Bat. No. 3 CH. 16.

Croix. D kaj FD (Junularo) : vakas.

Dijon (Bourgogne). VD : F-ino M. Lepinte, 22 rue des Perrières.

Limoges (Haute-Vienne). VD : A. Mathieu, 52 rue Théodore, Bac.

Reims (Marne). VD : A. Gilles, 12 boulevard Dieu-Lumière.

Germanujo

Kreuth b. Tegernsee (Bayern). D : F-ino A. M. Orterer, Rathaus. Tel : 0429/20.

Hispanujo

Tabernes de Valldigna (Valencia). D : S. Martinez Guillem, Avd. José Antonio, 15—II. Tel : 3.

Izraelo

Ramat Hadasa (Emek-Jezreel). D : A. Šalamon, Doar Kirjat Amal (apud Tivon). Tel : Kirjat Amal 289.

Tel-Aviv. FD (Komerco) : S-ino D. Wunderbaum, 22 Brennerstr.

Japanujo

Amagasaki (Hyôgo-ken). FD (Filatelo) : Haruja Maekaŭa, 451 Sakaeçi, Niši.

Kyôto. D : Vakas.

Tiba (Tiba-ken). D : J. Kitahara, 16 Nobutocho-Gochome. Tel : 3329, Chiba.

Tokio. FD (Belarto) : K. Suzuki, 816 Higasi-Oizumi, Nerimaku.

Kanariaj Insuloj

Las Palmas. FD (Elektrotekniko) : vakas.

Nederlando

Schoonoord (Drente). D : J. F. L. Lumaije Schuld, Kerkstraat D 191a.

Norvegujo

Mosby. D : vakas.

Portugalujo

Damaia (Estremadura). D : A. Ribeiro da Cruz, Estrada Militar, 27, 1° d°. Tel : 03.06.86.

Sudafriko

Pietermaritzburg. D kaj FD (Konstruado) : vakas.

Svedujo

Hälsingborg (Skåne). FD (Turismo) : vakas.

Svislando

La Sagne (Neuchâtel). D : C. Gacond, Crêt 99.

FD (Instruado) : La D.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Swarsensky, S-ro B., Herzlia, Izraelo
 Marcone, S-ro V., Varazze, Italujo
 Perra, F-ino J., Sain Bel, Francujo
 Moholm, S-ro R., Söråker, Svedujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955

ĝis 31 Januaro

120. Culbert, S-ro S. S., Seattle, Usono
121. Heilberg, S-ro L., Lusaka, Rodezio
122. Burgess, S-ro A. V., Kidderminster, Anglujo
123. Perini, S-ro G., Belluno, Italujo

124. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo
 125. Guerreiro Neto, S-ro J., Faro, Portugalujo
 126. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo
 127. Amaral, S-ro Inĝ. H., Funchal, Madeira
 128. Feis, S-ro G. Altenwald, Sarlando
 129. Schuler, S-ro H., Schiffwiler, Sarlando
 130. Schunk, S-ro P., Oberexbach, Sarlando
 131. Herrero, D-ro Rafael, Valencia, Hispanujo
 132. Zarraonandia, S-ro A. Pastor, Bilbao, Hispanujo
 133. Broise, S-ro A., Longué, Francujo
 134. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo
 135. Herlemont, S-ro H., Issy-les-Moulineaux, Francujo
 136. Hubert, S-ro P., Paris, Francujo
 137. Keller, S-ro Ad., La Celle-St.-Cloud, Francujo
 138. Lamant, S-ro L., Limoges, Francujo
 139. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, Francujo
 140. de Thomassin, Abato Paul, Issy-les-Moulineaux, Francujo
 141. Agnar, S-ro H., Bell Gardens, Usono
 142. Dunbar, S-ro R., London, Anglujo
 143. Hilder, S-ro E. C., Bideford, Anglujo
 144. Cochrane, F-ino I. M., Dunfermline, Skotlando
 145. Elderkin, S-ro T., Reading, Anglujo
 146. Fisher, S-ro A., Worthing, Anglujo
 147. Fuller, S-ro S. T., Brighton, Anglujo
 148. Gibson, D-ro W. A., Bathgate, Skotlando
 149. Goulding, S-ro E. I., Woking, Anglujo
 150. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo
 151. Jones, S-ro D. R. T., Lampeter, Kimrujo
 152. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo
 153. Leather, S-ro A. J., Blackburn, Anglujo
 154. Middlemast, S-ro A. H., Glasgow, Skotlando
 155. Lomo, S-ro Alfonso, Floral Park, Usono
 156. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo
 157. Marchand, F-ino M., Paris, Francujo
 158. Emmanuel, Pastro, Iskenderun, Turkujo
 159. Nolberg, S-ro E., Surte, Svedujo
 160. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo
 161. Persson, S-ro O., Trelleborg, Svedujo
 162. Krause, S-ro W., Berlin, Germanujo
 163. Bettges, S-ro J., Duisburg, Germanujo
 164. Goppel, S-ro L., Limburg, Germanujo
 165. Grundhoff, S-ro J., Wuppertal, Germanujo
 166. Kosutek, S-ro J., Kaiserslautern, Germanujo
 167. Kunzel, D-ro med. H., Bad Hersfeld, Germanujo
 168. Michling, S-ro Inĝ. H., Hannover, Germanujo
 169. Michling, S-ino I., Hannover, Germanujo
 170. Otterpohl, S-ro H., Weseke, Germanujo
 171. Sennhauser, Schwester A., Bern, Svisujo
 172. Mohr, S-ro J., Luzern, Svisujo
 173. Saltcastle, S-ro M., Bicester, Anglujo
 174. Fritzsching, S-ro K., Madras, Hindujo
 175. Assarsson, F-ino A., Hälsingborg, Svedujo
 176. Blomgren, S-ro Bror, Hälsingborg, Svedujo
 177. Lundgren, S-ro A., Hälsingborg, Svedujo
 178. Persson, S-ro Gösta, Hälsingborg, Svedujo
 179. Carlson, S-ro F., Seattle, Usono
 180. Dauzenroth, S-ro R., San Francisco, Usono
 181. Kovarik, S-ro F. J., Chicago, Usono
 182. Nace, S-ro P. E., Milan (Mich.), Usono
 183. Vedder, S-ro F. W., Miami, Usono
 184. Pannenberg, S-ro R., Nieuwe-Pekela, Nederlando
 185. Bink, F-ino A. B. M., Rotterdam, Nederlando
 186. Douma, F-ino J. S., Deventer, Nederlando
 187. Drost, S-ro J. F., Steenwijk, Nederlando
 188. Hölzenspies, D-ro W., Baarn, Nederlando
 189. Laverman, F-ino A., Leeuwarden, Nederlando
 190. Mantjes, S-ro A., Krommenie, Nederlando
 191. Mook, S-ro W. H., Groningen, Nederlando
 192. Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando
 193. Slijper, S-ro Chr. F. W., Utrecht, Nederlando
 194. Zorgdrager, F-ino C., Amerongen, Nederlando
 195. Janjić, D-ro F., Zagreb, Jugoslavujo
 196. Maruzzi, D-ro D., Ljubljana, Jugoslavujo
 197. Salberg, S-ro E. E., Selce, Jugoslavujo
- DONACIOJ al la Ĝenerala Kaso :** S-ro Kleyman 4ŝ. 9p., S-ino Scholtenten Cate 9ŝ. 10p., S-ro H. P. Wuenschal 8ŝ. 4p., S-ro Akerø 5ŝ., S-ro Wong Ken 3ŝ., S-ro J. Ridriguez 5ŝ., S-ro R. Francis 2ŝ. 6p., S-ro H. J. Bridger £3 17ŝ. 6p., S-ro W. Grice 5ŝ., S-ro Millidge 5ŝ., S-ro Eisele 7ŝ., S-ro H. Amarel 7ŝ., S-ro C. N. Ayres £2 6ŝ. 2p., S-ro

B. W. Reich 4ŝ., S-ro S. Unchitti 2ŝ. 6p.,
S-ro Mila 9ŝ., D-ro W. Trende 8ŝ. 4p.

Sumo ĝis 31.1.1955 : £1,175 1ŝ. 4p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : S-ro
S. S. Culbert 10ŝ., S-ro K. Lawrence 3ŝ. 6p.

JOHN C. RAPLEY, *Sekretario.*

Statistiko pri nia Membraro en 1954

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Acoroj ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Alĝerio ..	—	1	3	1	—	—	—	5
Argentino ..	—	1	59	2	—	3	—	65
Aŭstralio ..	90	4	62	14	1	11	—	182
Aŭstrujo ..	481	27	60	7	—	1	4	580
Belgujo ..	260	22	122	22	1	5	1	433
Borneo ..	—	—	—	—	—	1	—	1
Brazilo ..	2100	118	265	72	—	23	1	2579
Britujo ..	684	171	511	139	3	72	5	1585
Bulgarujo ..	—	—	2	—	—	1	1	4
Cejlono ..	—	—	1	—	—	1	—	2
Cipro ..	—	—	2	—	—	—	—	2
Ĉeĥoslovakujo ..	—	—	22	—	—	3	6	31
Ĉilio ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Ĉinujo ..	—	—	1	—	—	1	—	2
Danlando ..	1020	30	123	25	—	1	1	1200
Egiptujo ..	—	—	1	—	—	2	—	3
Finlando ..	—	65	250	—	—	1	1	317
Fr. Ekv. Afriko	—	—	1	1	—	—	—	2
Fr. Okc. Afriko	—	1	—	—	—	—	—	1
Francujo ..	527	71	386	56	—	14	10	1064
Germanujo ..	—	68	262	77	1	11	2	421
Gibraltaro ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Grekujo ..	—	—	8	—	—	—	1	9
Gvatemalo ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Hindujo ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Hispanujo ..	375	9	122	11	—	5	1	523
Honkongo ..	—	1	1	—	—	—	—	2
Hungarujo ..	—	—	2	—	—	—	3	5
Indonezio ..	—	—	3	1	—	—	—	4
Irano ..	—	—	—	—	—	2	—	2
Irlando ..	—	10	12	1	—	—	—	23
Islando ..	—	2	32	1	—	3	—	38
Italujo ..	1100	34	170	13	—	3	1	1321
Izraelo ..	—	—	21	—	—	2	—	23
Japanujo ..	—	15	83	—	—	—	1	99
Jugoslavujo ..	731	27	87	16	—	2	1	864
Kanado ..	—	4	22	8	—	3	—	37
Kanariaj Ins. ..	—	—	5	1	—	1	—	7
Kenjo ..	—	—	2	—	—	1	—	3
Kolombio ..	—	2	1	—	—	—	—	3
Kongo ..	—	—	2	1	—	—	—	3
Koreo ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Kostariko ..	—	—	4	—	—	—	—	4
Kubo ..	—	—	19	2	—	1	—	22
Libano ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Libio ..	—	—	9	—	—	—	—	9
Luksemburgo ..	—	—	1	—	—	—	—	1

	AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Madagaskaro ..	—	1	3	—	—	—	—	4
Madejro ..	—	—	3	1	—	—	—	4
Malajo ..	—	—	1	1	—	—	—	2
Maroko ..	—	31	24	30	—	5	1	91
Martiniko ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Maŭricio ..	—	1	—	—	—	—	—	1
Meksikio ..	—	—	19	—	—	—	—	19
Ned. Antiloj ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Nederlando ..	705	83	337	34	—	10	5	1174
Norvegujo ..	714	16	92	35	—	6	1	864
Nova Kaledonio	—	—	—	1	—	—	—	1
Novzelando ..	216	15	28	8	—	8	—	275
Ora Bordo ..	—	1	—	—	—	—	—	1
Polujo ..	—	—	2	—	—	1	2	5
Port. Okc. Afriko	—	—	4	2	—	—	—	6
Portugalujo ..	—	2	40	7	—	4	3	56
Rodezio ..	—	—	3	—	—	1	—	4
Rumanujo ..	—	—	—	—	—	—	1	1
Sarlando ..	—	1	22	1	—	1	—	25
Sieraleono ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Sud-Afriko ..	—	4	14	9	—	3	—	30
Sudano ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Svedujo ..	1269	145	342	71	—	18	2	1847
Svislando ..	130	68	91	21	—	31	3	344
Tajlando ..	—	—	—	1	—	—	—	1
Trinidado ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Tunizio ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo ..	—	—	13	—	—	—	—	13
Ugando ..	—	—	1	—	—	—	—	1
Urugvajo ..	—	2	20	5	—	1	—	28
Usono ..	496	22	115	38	1	15	1	688
Venezuelo ..	—	—	15	1	—	—	—	16
80 landoj	10898	1075	3943	741	7	278	59	17001

La supraj ciferoj montras kreskon kompare kun la statistiko publikigita en la februara numero de *Esperanto*. La kaŭzo estas ricevo de kelkaj AM-aligoj por tiu jaro post la jarfino.

Tre kuraĝiga signo estas, ke kie estas ioma forfalo de membroj, la kaŭzo estas preskaŭ sole la transpago-malfacilaĵoj. Kontraŭe, en la landoj (kaj estas multaj) kiuj progresis dum la jaro, tiu progreso estas cent-procente pro la persista varbado de niaj membroj mem.

Deziras Korespondi kun gesamideanoj en tutmondo pri diversaj temoj, precipe folklora muziko. Interŝanĝas pk, pm, gazetojn, gramofondiskojn pri popola muziko ktp. Herson F. Mamede, a/c João G. Filho, Prefeitura Municipal, Anapólis, Goiás, Brazilo.

S-ro Vicente García, Valle 9, TARRASA (Barcelona), Hispanujo, deziras interkorespondi, interŝanĝi belajn poŝtkartojn kun Madeiro, Acoroj, Islando, Grekujo, Indonezio, Afriko, Azio. Ĉiujn respondos.

Sendu 50 aŭ 100 pm. el via lando, Skandinavio, Anglujo, Nederlando, Svislando, Francujo, Italujo, kontraŭ sama el Danujo. Svend Balslev, Noestvedgade 6B, KØBENHAVN, Danlando.

Poŝtmarkoj. Sendu 100 aŭ pli da poŝtmarkoj de via lando. Mi sendos skandinavajn je la sama valoro (Zumstein). Ekstereŭrope lasaman kvanton. Herbert Levi, Esplanaden 21, KALMAR, Svedujo.

Deziras korespondi tutmondaj esperantistoj poŝtkartoj. Manoel Pedro da Silva, Rua Alaode, 71, c.6 (Madureira), RIO DE JANEIRO, DF., Brazilo.

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdato de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la Eternulo.
Jesaja 55. 8.

Henry Thomas Hamblin. *Dio Nia Centro kaj Nia Deveno* : 48-paĝa libreto pri la diversaj ecoj de Dio. Taŭga por meditado. Prezo unu ŝilingo (tri respondkuponoj), afrankite. Hipsley, 17 Abbots Road, BIRMINGHAM 14, Britujo.

Schola et Vita. Mi serĉas numerojn 1 (1926), 1-5 kaj 11-12 (1931), 1-2 (1932), ĉiujn numerojn post numero 4 (1932). Bonvolu sendi ofertojn al Donald R. Broadribb, 406 West Vermont, URBANA, Illinois, Usono.

Aktivaj gejunuloj kontaktu Kassai, Box 326, SUNDBYBERG 3, Svedlando.

Kvardekjara profesoro deziras dekkvartagan restadon (julio-aŭgusto) ĉe german-parolanta familio, prefere en Berner Oberland. Kompenso aŭ reciproka gastigado. Konijnenperken, 109, BOSVOORDE (Brussel), Belgujo.

Socialoficistoj deziras korespondi kun sociallaborantoj kaj sociale interesitaj personoj ĉiulandaj. S-ro Einar Lemdahl, S-ino Britt-Marie Lemdahl, Östbygatan 24 A, LIDKÖPING, Svedujo.

Bildkartojn pri artoj, deziras interŝanĝi kun la tuta mondo, Renée Correy, 20 rue Bersot, BESANCON, Francujo.

Londona gastejo, agrabla loĝloko.

Lito kaj matenmanĝo po 12ŝ. 6p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, "Flat Four", 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo. Telefono CUNningham 4487.

Mi deziras interkorespondi pri amatora fotografio kaj aktualaj aferoj. Certe mi respondos. Adreso : Marcel Lloberas, Fuente Vieja 7, TARRASA, Hispanio.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj en diversaj landoj. Mi certe respondos. Herman Zimmerman, Crijnsenstraat 51 hs, AMSTERDAM, Nederlando.

Ĉina Komerco Agento vendas ĉinajn ludkartojn, poŝtmarkojn kaj ĉiun alian materialon el Hong Kong al tutmondaj objektokolektantoj je tre moderaj prezoj. Deziras kontakti kun ĉiulandaj maristoj kaj ŝipanoj, kies ŝipoj vojaĝos al Hong Kong. Deziras korespondi kun usonaj gesamideanoj

kaj ĉiulandaj komercistoj. Korespondu aerpoŝte. S-ro Wong Ling Kai; 72 Lockhart Road, 1st Floor, HONG KONG.

Gesamideanoj ! Pasigu vian libertempon en Schliersee apud lago en la bavaraj alpoj. Informojn : S-ino Maria Lang, Miesbacher Str. 7/11, (13b) SCHLIERSEE, Germanujo.

Fraŭlino 27-jara, profesorino (kun diplomo de universitato por mezlernejoj) de la lingvoj angla kaj hungara, de la arthistorio, lernantino de pentroarto deziras havi diverslandajn korespondantojn pri literaturaj, artaj temoj. Adr. : Palma Nagy, V. Semmelweis u.2.III.3. BUDAPEST, Hungario.

Nova enpoŝigebla vojmapo de Norda Italujo. Jen por vi la plej taŭga landkarto el la ĝis nun aperintaj por tiu regiono. Ĝi estas juĝata de multaj eminentaj vojaĝantoj kiel eksterordinara, nekomparebla. En ok lingvoj. Skalo : 1 cm.=5 km. En 14 koloroj. Formato : cm. 78 × 115. Prezo : 750 liroj aŭ 13 rpk. Mendebla ĉe Rag. Paolo Bossi, via L. L. Zamenhof, n.21, PARABIAGO, Italujo.

Deziras interŝanĝi 100, 500, 1000 da p.m. kun la tuta mondo. Ĉiam respondos S-ro Fernando Oyarzábal, Basozábal 27, SONDICA (Vizcaya), Hispanio.

Mi deziras korespondi kun kuniklo-kulturistoj, mesaĝkolombokulturistoj kaj kun kulturistoj de pedigree-kokinoj. S-ro Ricardo Marín Yaseli, Alfonso I, 13-15, ZARAGOZA, Hispanujo.

Deziras korespondi tutmonde : František Mrtny, PREŠOV, Októbrová 12, Ĉeĥoslovakujo.

Internaciaj Feriaj Esp-Kursoj en Helsingør, Danlando,

okazos 17-24 de julio, 1955

Kursoj : Daŭriga, konversacia, preparo por Cseh-metodaj instruistoj—kaj por infanoj.

Prospekto havebla ĉe :

**L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.**

FINFINE !

ZAMENHOFA VERKO EN INDA VESTO !

NOVA ELDONO DE

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Bele presita per eleganta litertiparo sur tre bona papero
kaj fortike bindita en tolo kun surprisoj oraj kaj verdaj.

La teksto restas senŝanĝe, sed estas centoj da notoj kaj
klarigoj faritaj de
William Bailey, L.K. kaj W. J. Downes, Akademiano

Prezo 18ŝ. 9p., aŭfranko 1ŝ. 3p.

Eldonita de :

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LIMITED

Mendu ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

aŭ ĉe via enlanda libroservo